

SALGA ATTILA

MONDD MEG

AZ IGAZAT!

**A Debrecena Bulteno-ban megjelent
cikkek gyűjteménye**

**DIRU LA
VERON!**

**Artikoloj aperitaj en la revuo DEBRECENA
BULTENO**

SALGA ATTILA

DIRU LA VERON! - MONDD MEG AZ IGAZAT!

ARTICOLOJ, APERITAJ EN LA REVUO DEBRECENA BULTENO

Cikkgyűjtemény

az 1980-2003 között a DEBRECENA BULTENO (Debreceni Hírnök)

<http://bulteno.net84.net/news.php>

kéthavonta megjelenő számaiból

2003

Salga Attila

alkosoft.hu

D-ro Attila Salga

Kiu parolas fremdalingve ĉe ni?

Antaŭ kelke da jaroj oni komencis disvastigi - onidire, laŭ statistikaj indikoj -, ke dekkvin procentoj de la loĝantaro en nia lando parolas iujn fremdajn lingvojn. Sed la statistikon pri la "averaĝulo" la realo ofte refutas. Tamen kiel orientiĝas, kiel (povas) sukcesi la turisto veninta en nian urbon?

Pri tio ni serĉis respondojn, kiam mi kaj mia amiko kunmetis nian scion pri la lingvoj angla, germana, franca kaj rusa, kaj ni kiel "maskintaj" fremduloj, ekiris ekde la Granda Stacidomo de Debrecen, portante grandajn valizojn. Al ĉiu ni direktis la saman peton en diversaj lingvoj: "Bonvolu diri, kie oni povas ŝanĝi valuton!"

Nia elekto celas elegantan sinjoron mezaĝan. Nia malmulta scio en la franca lingvo apenaŭ naskas demandofrazon. La viro tuj redemandas: "Sprechen Sie deutsch?" (Ĉu vi parolas germane?) Jen nia jesa respondo li facile klarigas, kiel ni povas aliri la hotelon Arany Bika (Ora Taŭro). Kiel klariĝis, ni vane lin provis, ni sukcesi ne povis, li do estis instruisto de la germana lingvo. Ni apenaŭ kapablis lian prelegon aŭskulti pri Debrecen, ni jam tre volis liberigi nin de la "profesiulo". Feliĉe, aperas lia edzino, kaj lin kunprenas en vendejon de bakaĵoj.

Ni promesas ĉirkaŭ cent metrojn, por ripozi post la travivantaj ekscitoj. Iu maljuna virino venas post butikumado, ŝi eble preferus nian helpon en la portado de saketoj. La germana parolo ŝin ne konfuzas. Laŭtvoĉe, malrapide, silabumante ŝi klarigas (pensante, ke la kriado ni pli bone komprenas). "Mi ne kom-pre-nas, ka-ru-loj! Mi ne kom-pre-nas... Mi es-tas hun-ga-ra. Mi ne sci-as, ki-on vi be-zo-nas. Ĉu kla-re? I-ru plu, kaj ti-e pos-te pri-de-man-du i-un!" Ŝi demetas la saketojn, kaj per viglaj gestoj ŝi direktas nin plu al la centro. Tiel ni jam "komprenas" ŝin.

Poste ni alparolas tri mezlernejajn junulinojn en la rusa lingvo. La rideto, la konsilado-babilado kaj la hezito, per kiuj ili penas fokaŝi sian embarason, estas kompreneblaj ankaŭ "internacie", sed ilia lingva reago enhavas nenian uzeblan informon: "Tovariŝ...! - Diru al li, li demandu alian! - Ĉu diru mi??? Vi havis ja kvalifikon bonegan pri la rusa lingvo!"

Sekve ni plurfoje provadis per ĉiu el la kvar lingvoj. Ni ricevis responde ĉu nekomprenan kapskuadon, ĉu senkonsile dismetitajn brakojn. Iu damo kvazaŭ dirus angle "ne", sed baldaŭ klariĝas, ke ŝia respondo estas ne "no!", sed "no-no-no!", kiu signifas (en la hungara), ke ni tuj malaperu, ŝi ne kredas tiajn trukojn.

Ni esperas ricevi ĝojon en konversacianta, ridetanta grupo. Ili kaptas la vorton "valuto", ili gustumas ĝin kaj redemandas pri ĝi. "He, ili volas kaŝe valutumi!" Diras iu viro, bluĝine vestita, en serioza tono. Lia amiko silabumas adresante al ni: "Di-rek-tu vin al la na-ci-a ban-ko!" - "Bank', bank'..." mi kaptas la parolon por helpi al li, sed li jam neglektas nin, ili rakontas plu siajn obscenajn anekdotojn.

Ni renkontiĝas kun knaĉjo dekkelkvara. Ni interesiĝas anglalingve. Li iom surpriziĝas, enpensiĝas, poste per stupida rideto sin "elturnas": Boney M., Linda Lewis, Pink Floyd, AC/DC, Elvis Presley, Suzi Quatro, Rolling Stones, Rod Stewart... kaj io ajn, sed bedaŭrinde mi ne komprenas "engliš". Neatendite, antaŭ niaj okuloj aperas deĵoranta policano. Jen nia homo!

Ĉu al li helpas la internacia sono de la vorto valuto, aŭ lia rekono pri nia situacio? Estus malfacile decidi. Nian ruslingvan demandon li mansalutas kaj diras nur: "Ott!" (Tie!), kaj li montras al la pordo de IBUSZ (Vojaĝoficejo) en la domo de la Ora Taŭro, kien ni alvenis tute senrimarke. Ni eniras ja, sed post kelkaj minutoj ni tamen denove paŝas sur la trotuaron pro sumigi niajn spertojn. Sed tiam maljunaj, bone vestitaj geedzoj nin alparolas. Ili venis el FRG, kaj ili deziras iri al la vendoplaco. Kiam mia amiko klarigas al ili la vojon, la sinjorino notas: "Vidu, Hans, estus tute superflue por vi lerni la hungaran lingvon, tie ĉi ĉiu parolas la germanan lingvon!"

(El Hajdú-Bihari Napló)

trad. Tibor Papp

Pri la uzo kaj misuzo de la prepozicio JE

En la Esperanto-lingva gazetaro oni ofte faras erarojn pri la uzo de la prepozicio JE. Tio ne estas hazarda, ĉar la signifon de tiu vorteto diversaj lernolibroj difinas laŭ Plena Gramatiko de Esperanto de L. L. Zamenhof jene: ĉiu prepozicio havas konkretan kaj konstantan signifon escepte JE, kiu ne havas memstaran, difinitan signifon; kiam la rekta senco ne montras al ni, kiun prepozicion ni devas uzi, tiam estas uzenda la prepozicio JE.

Ĉu la regulo ne estas klara, ĉu ni ne povas difini la sencon rektan kaj konkretan? Inter esperantistoj ekzistas tiu "regulo", laŭ kiu oni povas uzi prepozicion JE ĉiam, kiam oni ne povas difini, konstati, kian rilaton (ĉu tempan, ĉu lokan ktp.) ĝi esprimas.

Ni vidu kelkajn frazojn kun malĝusta uzo de tiu prepozicio:

1. Tute merite je la 25-a – 26-a de septembro ĉi-jare la Bulgara Esperanto-Asocio okazigis sian jubilean Scienc-Praktikan Konferencon...(BE, 1982/10, p.7)
2. Fakte la kongreso komenciĝis je la 1-a de majo en Budapeŝto...(BE, 1982/8-9,p.17)
3. ...pluraj honoraj membroj alvenis jam je la 30-a de aprilo...(BE, 1982/8-9,p.17)
4. Ĝi aperos je Festosemajno de la Libro (HV, 1982/2,p.62)
5. Je la fino de riĉa kultura programo la ĉeestantoj aprobis la rezolucion protestantan kontraŭ la nuklea armado...(Standardo, 1982/6,p.7)
6. En Budapeŝto okazos la unua aeronaŭtika seminario en Esperanto je la temo...(BI, 1982/12,p.13)

En la frazoj 1-3 vortoj kun prepozicio JE signas tempoadjekton laŭ analogio "je la sesa horo". Tamen tiu analogio estas falsa, ĉar laŭ ĝusta Esperanto-logiko kaj regulo oni devas diri kaj skribi: la 25-an kaj la 26-an de septembro, la 1-an de majo, la 30-an de aprilo. Por esprimi tempon prepozicio JE estas uzata nur antaŭ adjekto de horo. Pro tiu kaŭzo en la frazoj 4-5 oni devas ŝanĝi la prepozicion je EN. Tiel same estas esprimoj malĝustaj: seminario je la temo (vidu la frazon 6 = seminario pri (la) temo, saluti iun je la nomo de prezidantaro = ...en la nomo..., partopreni je kunveno =...kunvenon) ktp.

Laŭ la Plena Ilustrita Vortaro kaj surbaze de analizitaj tekstoj ni povas ĉirkaŭskribi la signifojn kaj la praktikan, ĝustan uzon de tiu fenomeno. Ni devas tion fari, por ke ni malhelpu la oftan, superfluan uzadon de la prepozicio JE.

La prepozicion JE oni uzas preskaŭ nur en jenaj okazoj:

1. por esprimi (mal)abundon, senigon, kaj (anim)staton (adjektivo+JE+substantivo): (mal)riĉa je/de arbaroj, lama je unu piedo, digna je sia nomo, kontenta je/pri/de la laboro, ktp.;
2. por esprimi la valenton de kelkaj verboj kaj deverbaj substantivoj (verbo aŭ substantivo+JE+substantivo): rajti (-o) je/pri Esperanto, bapti (-o) je Helena, morti (-o) je kancero, kredi (-o) je socialismo, soifi (-o) je/pri scio, altigi (-o) je 7% ktp.;
3. por esprimi la tenatan korpoparton (verbo+akuzativo+JE+substantivo): kunduki lin je la nazo, li tenis sin je la brako ktp.;

4. por esprimi la adjekton de horo (JE+artikolo difinita+numeralo orda): je la deka horo kaj dek minutoj ktp.

5. por esprimi mezur-adjekton: vi estas je du kapoj pli malalta ol li, Helena estas je du jaroj pli juna ol ŝi ktp.

Kompreneble, tiu ĉi regulareto ne povas elĉerpi la tutan temon pri la uzo kaj misuzo de la prepozicio JE. Tamen - ŝajnas al mi - ĝi povas esti uzebla por pliĝustigi la parolon kaj skribon de esperantistoj.

d-ro Attila Salga
universitata adjunkto

Pri la uzo kaj misuzo de la prepozicioj POR kaj PRO

En la E-lingva gazetaro oni ofte faras erarojn pri la uzo de la prepozicioj POR kaj PRO. Tio ne estas hazarda, ĉar ili estas paronimoj, t.e. vortoj preskaŭ samsonaj, sed sence malsamaj (kiel kurso – kurzo – kuzo; baso – bazo ktp.). Tiuj fenomenoj havas ankoraŭ aliajn specialaĵojn: a) Laŭ PIV kaj Pechan-vortaroj en kelkaj sencoj ili estas identaj. b) En la hungara lingvo POR kaj PRO povas havi tiun saman signifon: -ERT. Tamen: la grava diferenco inter ili estas, ke la prepozicio POR signas ĝenerale celon de la ago kaj PRO – kaŭzecon de la ago.

Ni vidu kelkajn frazojn kun malĝusta, diskutinda uzo de la nomitaj prepozicioj.

1. Koran dankon POR la interparolo. (Slovaka Esperantisto, 1982/10,p.78.)
2. Reveninte en mian hejmon mi volas esprimi al vi kaj al AESSR mian elkoran dankon POR via afabla gastigado en Poprad kaj POR via helpemo. (Slovaka Esperantisto, 1982/10,p.80.)
3. La belegan preĝejon-monumenton... la bulgara popolo konstruis tie kiel esprimon de sia dankemo POR la liberigo... de Bulgario. (Slovaka Esperantisto, 1982/10,p.76.)
4. ...estis skribita la opinio de ekspozicianto: kion signifas Esperanto por li (ŝi), POR kio li uzas la internacian lingvon? (Kolektanto, 1980/3,p.13.)
5. La 19-an de junio... la esperantistoj el Várna POR kvara fojo estis dommastroj de granda E-aranĝejo – MARE '82... (Bulgara Esperantisto, 1982/8-9,p.28.)
6. Ankaŭ ĉiujare (ĝuste: ĉi-jare!) okazas (ĝuste: okazos) konkursoj POR la Balatona Pokalo de aŭtistoj kaj POR memoro de la poeto Attila József. (Hungara Vivo, 1982/2,p.68.)

Post la verbo "danki" en la angla lingvo oni uzas prepozicion FOR, en la rusa kaj kelkaj slavaj lingvoj -- ZA. Ili povas esprimi kaj celan kaj kaŭz(ec)an rilatojn. Kiam oni dankas ĉu oni diras dankon pri tiu kaŭzo, ke oni ricevis donacon, ĉu tiucele, ke oni ricevis donacon? Ŝajnas, ke oni devas retromontri, ĉar oni devas danki pro donaco, pro kaŭzo farita de alia homo. El vidpunkto de la donacinto la donaco estas ĝuste celo, sed ricevinto dankas PRO donaco "el sia vidpunkto" – kiel PRO kaŭzo. Malgraŭ tio, ke en PIV (v.p.848) oni proponas egalajn formojn kun POR kaj PRO, laŭ la menciita kaŭzo mi uzus en la frazoj (1), (2) kaj (3) la prepozicion PRO.

En la frazo (4) devus esti PRO kio, ĉar la skribinto demandas eble ne pri tiuj kaŭzoj, kiuj motivigis lin (ŝin) uzi E-n, sed li volas sciigi POR kio (por kiuj celoj) li (ŝi) uzas Esperanton.

Por bulgaraj esperantistoj el Varna ne tiu estis la celo, ke ili estu dommastroj POR la kvara fojo (v.la frazo (5)). Ilia celo estis sukcese aranĝi MARE'82, kies dommastroj ili estis LA KVARAN FOJON. En la frazo (6) oni devas skribi alimaniere. Ĉu oni povus (-is) aranĝi tian malhonorigan konkurson, en kiu la partoprenantoj batalus (-os) POR la memoro de granda poeto? (Por akiri lian memoron?!) Temas, eble, pri konkursoj aranĝotaj JE la memoro de A. József. Laŭ malklareco de la frazo oni tamen povas deĉifri, ke iu konkurso estas (-os) nomita PRI la hungara poeto.

d-ro Attila Salga
universitata adjunkto

Ni uzu ĝuste la vorton ankaŭ!

Eble neniuj pensas, ke oni povas erari en la uzado de la adverbo maniera ankaŭ, ĉar ekzistas ĝusta, fidinda regulo: tiu ĉi vorteto staras ĉiam senpere antaŭ tiu vorto, al kiu ĝi rilatas, kies signifon ĝi konkretigas. (Vidu en PIV, p.49). Malgraŭ tio oni ofte povas legi frazojn, en kiuj ankaŭ estas uzata malĝuste.

A/

"En la malnova urbo Elena, situanta en la... Balkan-montaro, ankaŭ ekbrilis la verda stelo" (BE, 1982/4, p.9). "La esperantlingvaj prikomputadaj elodanaĵoj ankaŭ povas partopreni la tutlandan migratan ekspozicion de prikomputada literaturo" (BI, 1982/3, p.11).

Estas sendube, ke oni devas starigi la vorton ankaŭ senpere antaŭ tiu vorto, al kiu ĝi rilatas. Do ĝuste – oni devas kompreni la frazojn jene: la verda stelo pasinttempe ekbrilis en diversaj urboj, ĝi ekbrilis ankaŭ en la malnova urbo Elena...; en ekspozicioj partoprenas diverslingvaj literaturaĵoj prikomputadaj, povas partopreni ilin ankaŭ esperantlingvaj.

Estas menciinde, ke en multaj naciaj lingvoj – inter aliaj en kelkaj slavaj – estas uzataj du-tri vortetoj en signifo de E-lingva ankaŭ (ekz-e ruse: u; то́же; та́кже, bulgare: u; то́же, същоу; pole: i-też, także, również ktp.). Tiuj vortetoj povas stari antaŭmetite (ekz-e i, u) kaj postmetite (ekz-e то́же, też) Tio signifas, ke post la uzado de ankaŭ en E estas kaŭzita de negativa transfero de naciaj lingvoj. Vidu ankoraŭ malĝustan ekzemplon: "Tio estas libro. Tio estas ankaŭ libro." (J. Markov, K. Valev, I. Safarov: Lernolibro de Esperanto por la unua lernojaro, Narodna Prosveta, Sofia, 1976, p.13).

En PIV (p.49) oni skribas: "...nur ĉe la personpronomoj Z. iafaje metas la adverbos poste". Ĉar la E-gramatiko estas logika, senescepta, ŝajnas al mi, ke ni tute ne devas disvastigi tiujn frazojn: "Mi ankaŭ deziras malgrandan fromaĝkukon." (A. Pettyn: Ĉu vi parolas Esperante? Warszawa, 1974, p.89). "Vi forgesis, ke mi ankaŭ laboras en vendejo post la kurso." (Metodiko en praktiko. E-Centro Paderbron, HEA, Bp. 1982, p.63).

B/

"Ankaŭ vintre ne malpleniĝas la ĉirkaŭaĵo de Balatono." (HV, 1982/2, p.68) EĈ vintre... Adverbo maniera estas uzata por signifi insiston pri la realeco de neatendita, malfacile kredebla fakto, t.e. "plie, krome, malgraŭ ĉia atendo" (v. PIV, p.214). Oni devas uzi EĈ ne nur pro tio ĉi kaŭzo, sed eĉ laŭ alia regulo: ĉe negativa (nea) vorto en la frazo estas malĝuste uzi la adverbos ankaŭ.

C/

Ni citos nun ĝustan frazon kun adverbo ankaŭ, kaj ni klarigos ĝian signifon. "Kun la estraro kaj laboristaro de la kooperativo ni pridiskutis komunajn fakajn problemojn,

malfacilaĵojn kaj klopodojn rilate al ilia solvado. Nia delegitaro konatiĝis ankaŭ (ĝuste!) pri vivcirkonstancoj kaj pri kultura vivo de la kooperativoj. (BI, 1982/4, p.3) Tio signifas: komence la delegitaro konatiĝis kun fakaj problemoj, poste kun "aliaj aferoj", do ankaŭ pri la vivcirkonstancoj... de la kooperativanoj. La kunligo inter la unua kaj la dua partoj de la komunikaĵo estas esprimita per la vorto ankaŭ. Tiun interrilaton oni tute ne vidas en jena frazo: "La pinton ni vizitis per lifto, de kie ni povis vidi en la malproksimeco ankaŭ la neĝan montopinton de Olimpos en Grekio." (BI, 1982/12, p.25). Oni devas antaŭmencii, kion oni vidis ankoraŭ krom pinto de Olimpos, kontraŭe, oni devas lasi la adverbbon ankaŭ.

Nia temo ne estas ankoraŭ elĉerpita, tamen ne necesas analizi plu diversajn frazojn. Espereble, ni povis pruvi, ke uzado de la adverbo ankaŭ postulas grandan atenton.

d-ro Attila Salga
universitata adjunkto, Debrecen

Numero 027 (decembro 1985)

Matena interparolo

Ni iras sur la strato al la suĉinfan-vartejo. Mia fileto havas tri jarojn. Antaŭ kelkaj semajnoj ni transloĝiĝis al nova loĝejo. Bedaŭrinde, mi estis tre okupita en mia laborejo, mi ne povis eĉ renkontiĝi kun ili. Frumatene mi iris labori kaj malfrue mi alvenis hejmen. Poste, kiam ni finfine ekvidis min, li demandis mirante:

– Paĉjo, ĉu ankaŭ vi loĝas kun ni?

Nun li diras:

– Paĉjo mia! Rigardu, kiel bone fartas la aŭtomobiloj! Ili povas bani sin en la pluvmarĉetoj, ĉar ili ne havas patrojn kaj patrinojn, ili ne malpermesas, kiel vi. La aŭtoj ja estas jam plenkreskuloj...

Ĉiam li diras stultaĵojn. Hieraŭ li volis esti elefanto, ĉar ĝi povas akvumi sin.

– Ĉu vi vidas? - mi diras - , tie venas konato. Ni jam interkonsestis, ke vi devas saluti plenkreskulojn.

– Bonan matenon! - mi diras al mia konato, kaj poste mi palpebrume igas mian filon saluti lin. Li silentas.

– Kial vi ne salutis la oĉjon?!

– Mi salutis lin... Vere, mi salutis mallaŭte.., ĉar, ĉar... mi ankoraŭ ne havas tiel grandan buŝon, kiel vi...

– Fileto mia! Kion vi diris? Kiu diris al vi tion? Ĉu?

– Kiu? La panjo. Hieraŭ. Ĉu vi rememoras? Ni lernis jam multe en la suĉinfan-vartejo. Mi ja scias, ke oni devas diri ĉiam la veron. Kaj Monika diras ĉiam la veron. Ŝi jam scias, kiel naskiĝas la beboj. Ĉu vi scias tion? Vi povas demandi ŝin... Jes, paĉjo, vi devas lerni multe...!

Attila Salga

Numero 028 (februaro 1986)

Skizoj de kontrasta esperanta-hungara gramatiko

Unua parto

Numero 029 (aprilo 1986)

Skizo de kontrasta esperanta-hungara gramatiko

(daŭrigo)

Dua parto

Numero 031 (junio 1986)

Skizoj de kontrasta esperanta-hungara gramatiko

(daŭrigo)

Tria parto

RIMARKO DE LA AŬTORO

Karaj Legantoj!

Tri partoj de tiu laboraĵo aperis en la Debrecena Bulteno.

En 2009 estis eldonita Abunda fonto je memoro profesoro István Szerdahelyi. En tiu volumo oni povis legi tiun traktadon traredaktitan, aldonitan, korektitan. Anstataŭ la originan studaĵon la aŭtoro proponas al vi tiun lastan varion.

(Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi. Redaktis: Ilona Koutny. ProDruk & Steleto, Poznan 2009. p. 214-221)

Dr. Szerdahelyi István (1924-1987) eszperantó professzor emlékére Abunda fonto (Bőséges forrás) címmel 405 oldalas tanulmánykötet jelent meg 2009-ben. (Abunda fonto. Redaktis Ilona Koutny. ProDruk, Poznan 2009.) Hat fejezet 50 tanulmányát olvashatják el a nemzetközi nyelv ismerői. Salga Attila a "Skizo de kontrasta Esperanta-Hungara gramatiko" (Az eszperantó-magyar összevető nyelvtan vázlata) című munkájával jelentkezett. (214-221. old.) Ez utóbbi, javított változatot közöljük most.

Skizo de kontrasta esperanta-hungara gramatiko

Estas konata fakto, ke la finnugro-devena hungara lingvo multe diferencas de la hindeŭropaj lingvoj. Esperanto estas la plej nova branĉo de tiuj lingvoj; ĝi havas simplan, rapide lerneblan gramatikon, tamen la hungaroj lernas ĝin pli malfacile ol aliaj, kies gepatra lingvo estas hindeŭropa (germana, angla, franca, itala, hispana ktp.).

La celo de la skiza kontrastigo de la du lingvosistemoj estas akcenti la plej rimarkindajn kazojn, havantajn diferencojn en la Esperanta kaj hungara gramatikoj. Diferencoj inter du lingvoj estas granda misforto-misfondo de niaj eraroj fonetikaj kaj gramatikaj.

I. Fonetiko, fonologio

Fonetiko estas parto de la gramatiko, studanta la sonojn, ilian elformadon, variojn, transformiĝojn. Fonologio okupiĝas pri la fonemoj de lingvo, kiel konsistigantaj unu sistemon de kontrastaj unuoj; ĝi celas grupigi la fonemojn de unu lingvo laŭ funkcioj en tiu lingvo. Por kompreni esencon de tiuj difinoj ni donos ekzemplojn.

Kiam oni skribas, ke Esperantan konsonanton (b) oni devas produkti plozive kaj labiale, oni parolas pri sonoj (fonetiko). (b) kaj (v) en Esperanto estas apartaj fonemoj /b/ kaj /v/, ĉar ili diferencigas sencon de vortoj: *bal*o-*val*o, *ra*b*i*-*ra*v*i*. Vidu aliajn fonemparojn: *rad*o – *lad*o, *rev*i – *lev*i, *ba*k*i* – *pa*k*i*, *mar*d*o* – *mar*t*o*, *fr*ag*o* – *fr*ak*o*, *pe*s*i* – *pe*z*i*, *cent*o-*sent*o, *plac*o – *plac*o, *piz*o – *pez*o, *val*o – *vel*o, *mar*o – *mur*o ktp.

En Esperanto ĉiuj fonemoj estas skribe reprezentataj de speciala litero, tio signifas, ke ĝia ortografio estas fonologia (fonematika).

En la hungara lingvo – kiel en Esperanto kaj aliaj lingvoj – oni povas kontrastigi fonemojn laŭ siaj diferencoj: *baj* – *vaj*, *ĵaj* – *ĥaj*, *hal* – *hall*, *kéz* – *kész*, *baj* – *báj*, *tok* – *tök*, *örült* – *őrlült*, *irt* – *irt* ktp.

Ĉar fonemo diferencigas sencon de vortoj kaj vortformoj, oni devas senerare realigi ilin en formoj de diversaj sonoj. Laŭsone la hungara lingvo estas varia kaj riĉa. Kaj ĝiaj konsonantoj kaj ĝiaj vokaloj sonas bele, prononciĝas per malfermita buŝo, klare artikulaciite.

Sistemo de vokaloj apartenas al plej variaj sistemoj. Tiun varieblon kaj tiuokaze tiun emfazeblecon plivarias akra kontraŭo de longaj kaj mallongaj vokaloj. La sistemo de konsonantoj estas riĉa. Proksimume similan oni povas trovi en slavaj lingvoj, sed en la hungara lingvo ankaŭ la konsonantoj kontrastas je longeco/mallongeco.

A) Vokaloj

Oni ofte diras, ke en Esperanto la vokaloj devas esti prononcataj kiel en la ĉeĥa, slovaka lingvoj, do malfermite, klare artikulaciite, sen redukto. Tiukaze la Esperanta vokalsistemo similas al la hungara, tamen estas kelkaj diferencoj:

1. E-a fonemo /a/ realiĝas en parolo ne kiel hungara (a) aŭ (á), ekzemple en la vorto *ajtó*, sed kiel E-a (a): (*a*)*d*(*a*)*ĝo*, (*a*)*k**vo*, (*a*)*k**v*(*a*)*rio*, *bon*(*a*), (*a*)*f*(*a*)*bl*(*a*) ktp. Hungaroj, vivantaj en la norda parto de Okcident-Hungario, tiel nomataj *palócok* („palocoj”), prononcas „internacian” (a) – iliaj lipoj ne estas rondigitaj kiel en la normigita hungara prononcado; ili estas fermitaj.
2. Fonemo /e/ en E-o realiĝas en sonoj (ë). Tio signifas, ke ili estas prononcataj de la hungaroj kiel (e) kaj (é). (é) estas pli fermita ol (e). Esperantan (ë) oni prononcas inter fermita (é) kaj malfermita (e). En kelkaj hungaraj dialektoj oni diferencigas (e) kaj (ë) kiel fonemojn: *m*(ë)*ntek* ('ili iris'), *ment*(ë)*k* ('mi savas'), *félt*(ë)*m* ('mi havas zorgon', 'mi timas pri...'), *félt*(e)*m* ('mi timis') ktp. Do (ë) prononciĝas duonfermite kiel ĉiuj Esperantaj vokaloj.
3. Duonvokalo /ŭ/ troviĝas ĝenerale nur post vokaloj /a/, /e/, /o/ kiel „aŭ”, „eŭ”, „oŭ”. Ĝi neniam formas apartan silabon. Laŭ tiu "duonstato" (ĝi ekzistas kaj ne ekzistas) ĝi realiĝas en parolo tre mallonge, precipe en la fino de vortoj. Do E-a (ŭ) neniam egalas al hungara (u), kiu estas pli longa kaj formas apartan silabon.
4. Vokaloj en Esperanto ne kontrastas laŭ longeco/mallongeco kiel en la hungara lingvo. Kolomano Kalocsay proponis la sekvajn regulojn: „La elparolo de vokalo en akcenta silabo dependas de tio, ĉu ĝin sekvas unu aŭ pluraj konsonantoj.
 - a. Se ĝin sekvas pluraj konsonantoj, ĉi tiuj mem certigas la longecon de la silabo, la vokalo do estas mallonge prononcata.
 - b. Se ĝin sekvas unu konsonanto aŭ vokalo, la akcenta vokalo povas mem certigi la longecon de la silabo, ĝi do estas longe, tirate prononcata.” (Kalocsay 1931:119).

B) Konsonantoj

La Esperanta konsonanta sistemo pli similas al la hungara ol la vokala sistemo. Sed estas menciinde, ke en E-o oni malofte uzas duoblajn konsonantojn (*vorttrezoro*, *finna*). Al ili konvenas mallongaj fonemoj /t/, /n/ kaj sonoj (t) kaj (n). Esperantaj konsonantoj do ne kontrastas laŭ longeco/mallongeco.

Nur la fonemo (ĥ) ne ekzistas en la hungara lingvo, sed ĝia stato estas ne fiksita eĉ en E-o. Ĝi laŭgrade perdas sian fonemrolon. Estas egale ĝustaj: *kemio-ĥemio*, *kameleono-ĥameleono*, *kirurgo-ĥirurgo*. Sed en aliaj vortoj nuntempe ankoraŭ restas la gorĝa-frota /ĥ/ anstataŭ la pli internacia, laringa-frota /h/ (*ĥoralo*, *ĥimero*, *ĥoro*). Parenteze ni notu, ke la forigon de la gorĝa-frota /ĥ/ malhelpas ankaŭ signifo-diferenco, estiĝanta per /k/, ekzemple *ĥolero* ne povas esti anstataŭiganta per *kolero*, ĉar tiu vorto jam estas okupita por alia nocio. Anstataŭ *ĥoro* oni uzas ne *koro* aŭ *horo* – ĉar ili jam havas alian signifon – sed *koruso*. En aliaj vortoj oni uzas la originalan ortografion kun la gorĝa-frota (ĥ) plejparte pro la normiga rolo de Plena Ilustrita Vortaro.

Estas konate, ke proksimaj sonoj povas influi unu la alian iurilate. Ekzemple, oni skribas: *adĵon*, *féltsétek*, *látszik*, *fesd*, sed doni devas elparoli: *agĵyon*, *félcsétek*, *láccik*, kaj *fezsd*. Ĉar Esperanto estas tute fonemika lingvo kaj ĉiu aparta fonemo (sono) en ĝi devas ne kondici kun iu ajn alia, estas permesata nur la procezo de asimilado regresa: *absurda-apsurda*, *ekzisti-egzisti*, *diŝŝiri-diŝŝiri* ktp. Laŭ prononca normo de E-o estas malĝuste diri: *univerzitato*, *diverza* anstataŭ *universitato*, *diversa*.

E. A. Bokarjev (1974:30) skribas: „Ne estas rekomendataj, sed eble nur tolerataj ankaŭ kelkaj aliaj eventualaj fonetikaj procedoj en parolĉeno, kiuj povas aperi en Esperanta prononco pro influo de naciaj lingvoj:

- a) transformiĝo de sonkombinoj (ng) en uvulan (n) (*sango*, *atingi*);
- b) palataligo de konsonantoj antaŭ /j/ (*sinjoro*, *panjo*);
- c) apero de (j) inter vokaloj (*ĉielo*=ĉijelo, *piedo*=pijedo, *mia*=mija).

Ni devas atenti pri tiuj konsiloj, ĉar ili karakterizas ĝuste la hungaran prononcmanneron: hara (ĥ)g, koro (ĥ)g; ki(nny)a; turbá(nny)a; si(j)et, fi(j)atal, mi(j)e(j)ink.

II. Morfologio

Morfologio estas parto de gramatiko, studanta diversajn formojn, alpreneblajn de la vortoj por esprimi la rilatojn, kiujn la sintakso estigas inter ili. Ĝi okupiĝas do pri vortfarado, deklinacioj, konjugacioj de vorto(speco)j.

Serĉante kontraŭpunktojn en Esperanto kaj la hungara lingvo, komence ni devas konstati iun similan aferon. La vortfarado en la du lingvoj baziĝas sur riĉa sufiksaro, prefiksaro kaj reprezentas la plej grandan valoron.

Unuavice ili kaŭzas konjektemon, delikatajn nuancojn kaj mallongecon. Tiuj ecoj de E-o kaj la hungara lingvo helpas al verkistoj surpaperigi siajn sentojn kaj pensojn tre varie.

Vortoj en ambaŭ lingvoj dividiĝas je vortospecoj, parolelementoj. Kiam oni dispartigas la parolelementojn de iu lingvo, oni devas priatenti diversajn aspektojn – signifon, konjugacian, deklinacian eblecon de vortoj ktp. Laŭtradicie en la du lingvoj ekzistas diversaj nombroj de vortospecoj:

- a) Komunaj: substantivo, adjektivo, pronomo, numeralo, verbo, adverbo, artikolo, interjekcio (konjunkcio kaj subjunkcio en la hungara lingvo kune nomiĝas „kötőszó”).
- b) Nur en E-o: prepozicio.
- c) Nur en la hungara: modifvorto, postpozicio, prefikso.

La malsimpla, riĉa kunjugacio, ĉ. 20 kazoj de substantivoj en la hungara lingvo ne estas kompareblaj kun la funkcioj kaj formoj de E-finaĵoj „-n” kaj „-j”. En E-o ĉio estas pli simpla, pli facile lernebla ol en la hungara.

Ĉi-sube ni deziras fari kelkajn menciojn rilate la Esperantajn vortospecojn, kiuj kaŭzas malfacilaĵojn al la parolantoj hungare.

1. En ambaŭ lingvoj ne ekzistas genroj, sed oni povas esprimi seksojn. (En la hungara lingvo per sufikso *-né* kaj vortoj *nő, asszony, néni, bácsi, férfi* ktp.) En E-o por tiu servas la sufikso *-in* kaj prefikso *ge-*. Estas utile rigardi en PIV, kion oni skribas pri prefikso *ge-*.

Oni uzas ĝin por signi paron (*gesinjoroj, geedzoj*), samgradajn parencojn el ambaŭ seksoj (*geavoj, geonkloj*), personojn de ambaŭ seksoj (*gelernantoj, geknaboj*). „Ofte en tiu lasta signifo, la prefikso estas senutila (*samideanoj, lernantoj, kursanoj k.s.*), aŭ malpli ĝentila en la alparolo, ol la duobla nomado (*sinjoroj kaj sinjorinoj!*).” (PIV 1970:337). Vorto-tipoj *edzo – edzino – geedzoj*, konsistantaj el du personoj, havas diferencon en la hungara lingvo: *férj – feleség – házaspár* (viro + virino), sed en „multnombreo” virinoj ne povas esti signifitaj kiel en E-o per prefikso *ge-*: amiko(j) **barát(ok)** – amikino(j) (*barátnő(k)*) – geamikoj **barát(ok)**.

2. Hungaraj vortoj, signantaj ecojn de objektoj kaj vortoj kun objektaj signifoj (t.e. adjektivo kaj substantivo) povas neŭtriĝi en la kunteksto: *arany = oro, ora, ezüst = arĝento, arĝenta, magyar = hungaro, hungara, cseh = ĉeĥo, ĉeĥa* ktp. Komencantaj, nespertaj esperantistoj ne ĉiam malkovras tiun specialecon, kaj ili faras erarojn laŭtipe: **En la pasinta jaro mi renkontiĝis kun bulgara (aldonu: „esperantisto”!)*.

3. Kial oni ne deklinacias la bazajn numeralojn en E-o? Ĉar ili estas tiom internaciaj, ke ili ne alprenas E-finaĵojn, ili do ne estas „esperantigitaj”. En la hungara lingvo oni devas deklinacii la bazajn numeralojn. Tamen en adjektiva funkcio iam Zamenhof mem deklinaciis la vorteton „unu”: *„La regado de unuj gentoj super aliaj estas restaĵo el antikva tempo; unuj objektoj venis en unujn manojn, aliaj en aliajn manojn.* (PIV 1970:115). Laŭ nia opinio plej ĝuste estus ne deklinacii la vorton „unu”, ĉar la nuntempa lingvouzo postulas kaj atestas tion.

4. La kolektiva pronomo „mindenki” havas nur singularan formon kontraŭ en E-o *ĉiu, ĉiuj*. La lastan formon oni uzas por signi la tuton de homoj, bestoj, objektoj, kaj *ĉiu* estas konvena por akcenti apartecon: *Ĉiuj alvenis, ĉiu aparte. Mi volas legi ĉiun libron. Mi ne volas tiun aŭ tiun libron, sed ĉiujn.*

5. La hungara verbo povas esprimi la estantan kaj la estontan tempon laŭsituacie per la samaj finaĵoj: *Most Budapestre utazom. Nun mi veturos al Budapeŝto.* [Mi diras antaŭ la vojaĝo.] *Most Budapestre utazom. Nun mi veturas al Budapeŝto.* [Mi diras dumvoje.] En E-o oni diferencigas tiujn tempojn per finaĵoj „-as” kaj „-os”. Oni pli ofte, eĉ pli precize akcentas la futuron de E-verbo en diversaj situacioj.

6. La hungara verba prefikso estas memstara parolelemento. Vidu tipan gepatran konversacion, kiam la prefikso ripetigas aparte, kaj ĝian E-an tradukon: – *Leírtad a házi feladatot? Ŭu vi skribis vian hejman taskon?* (Laŭvorte: suben skribis.) – *Le. (Suben)* [Jes.] – *Megtaláltad a könyvet? Ŭu vi trovis la libron?* – *Meg. [Fin’].* [Jes.] Kaj oni povas ripeti iun ajn „ŝlosilan” vorton: – *Azt a könyvet kerested? Ŭu vi serĉis tiun libron?* – *Azt. (Tiun.)* [Jes.] – *Holnap jön édesanyád? Ŭu via patrino venos morgaŭ?* – *Holnap. (Morgaŭ.)* (Salga 1984:84).

7. En E-o la vorteto *ankaŭ* (*is, szintén*) staras ĉiam senpere antaŭ tiu vorto, al kiu ĝi rilatas. En la hungara estas kontraŭe: *Ankaŭ Petro foriris. – Péter is elment.* (Kalocsay 1966: 200; Salga 1985:11). La adverbo maniera *ankaŭ* povas havi eĉ subjunkcian rolon. Jen ekzemplo: *Azt is szeretném mondani, hogy jó gyerek legyél! Mi ŝatus diri ankaŭ, ke vi estu bona infano!* En tiaj kazoj alkomprene *ankaŭ tion, ke ...* Ni devas noti, ke Zamenhof kelkloke uzis la vorton *ankaŭ* tuj post personaj nomoj, ĝenerale, kiam ili estis la unuaj vortoj de frazoj. Ekzemple: *Petro ankaŭ foriris.* (Nun oni dirus: *Ankaŭ Petro foriris.*) Laŭ mi: ne imitu tiajn frazojn de Zamenhof. La uzregulo de „ankaŭ” estas unusenca!

8. Oni ofte eraras, kiam oni uzas prepoziciojn „por” kaj „pro”, ĉar ili havas la saman hungaran signifon: „ért”. Tamen: la grava diferenco inter ili estas, ke la prepozicio „por” signas ĝenerale celon de la ago (venontecon) kaj „pro” – kaŭzecon de la ago (pasintecon) (Salga 1985a:18).

9. Laŭ la hungara pensmaniero estas uzata pli ofte singularo ol pluralo: du manoj signas „unuon” de membroj, do la hungaraj formoj de okuloj, piedoj, kruroj, haroj, oreloj, ŝtrumpetoj, ŝuoj, botoj, eĉ bananoj, citronoj (fruktoj) estas nomataj ĝenerale en singularo.

III. Sintakso

Sintakso estas parto de la gramatiko, rilatanta al la konstruo de la frazoj, t.e. al funkcio, reciprokaj rilatoj kaj aranĝo de vortoj en sintagmo kaj de la prepozicioj en la frazo.

Gramatikaj rilatoj esprimataj inter vortoj en la hungara kaj E-sintagmoj povas esti diversaj:

1. La hungara adjektivo ne povas alpreni finaĵojn en la funkcio epiteta: *fehérØ ingek* – *blankaj ĉemizoj*, *fehérØ inget* – *blankan ĉemizon*. Kiam la adjektivo estas uzata memstare (substantivige aŭ en rolo predikata), ĝi deklinaciigas: *Ezek a ceruzák sárgák.* – *Tiuj krajonoj estas flavaj. A sárgákat add ide!* – *Donu al mi la flavajn* (komprenu: *krajonojn*)!

2. Kelkaj E-aj kaj hungaraj vortoj (en sintagmoj) havas malsaman (rekta) objekton/regajon. Ekzemple:

hontiØ – *szégyelli magát* (tranzitiva!) *vmi miatt* (pro io)
farti Ø (bone) – (jól) *érzi magát* (tr)
konduti Ø (bone) – (jól) *viseli magát* (tr)
bezoni ion – *szüksége van vmire* (sur!)
havas ion – *van vmije* (estas!)
pensi ion, *pri io* – *gondol vmit* (tr./vmire), *sur ion*
preferi ion ol/al – *jobban szeret vminél (ĉe)*, *vmit* (tr)
(li) *devas fari* – *neki (al li) kell csinálni(a)*
riĉa je io – *gazdag vmiben* (en)
paralela al io – *párhuzamos vmivel* (kun)
fiera pri io – *büszke vmire* (sur ion)
kontenta pri io – *elégedett vmivel* (kun)
egala al io – *egyenlő vmivel* (kun) ktp.

3. La gramatika rilato inter vortoj en E-aj kaj la hungaraj sintagmoj povas realiĝi:

a) <u>per prepozicioj</u>	b) <u>per postpozicioj</u>
<i>super la domo</i>	<i>a ház fölött</i>
<i>sub la domo</i>	<i>a ház alatt</i>
<i>post du semajnoj</i>	<i>két hét múlva</i>

c) per finaĵoj (en la hungara lingvo oni nomas ilin: *fleksiaĵo*, *fleksiilo* – *rag*; *radikelferma gramatika morfemo* – *jel*; Szerdahelyi – Koutny 1996:345, 609): *Li legas libron.* *Könyvet olvas.* *Li ŝatas rigardi filmojn.* *Szeret filmeket nézni.* *La libroj estas sur la tabloj.* *A könyvek az asztalon vannak.*

d) per participoj: *laboro*, *daŭranta* ses tagojn – *hat napig tartó munka*; *direktoro*, *estimata* de ni – *általunk tisztelt igazgató.*

Esperantistoj, kies gepatra lingvo estas la hungara, eraras ĝenerale en jenaj kazoj:

- A) Anstataŭ *Estas interesa*, ke... oni devas diri: *Estas interese*, ke... Kiam oni ne povas kunordigi laŭfinaĵe la adjektivon, ĉar en la frazo ne estas substantivo aŭ pronomo, oni devas uzi adverban formon. En la hungara lingvo substantivo kaj adjektivo povas esti samformaj.
- B) La refleksivo estas uzata nur rilate kun la subjekto, se el la pronomoj nur kun la tria-personaj: *li ŝi ĝi, ili.* *La patrino rigardas siajn filojn.* *Ili ne forgesis pri sia tasko.* *Ŝi longe rigardis sin en la spegulo.* (Ofte hungaroj ne povas diferencigi: *Ŝi rigardas ŝin.* *Ŝi rigardas sin.*)
- C) En E-o la baza vortordo estas: subjekto + predikato + (rekta) objekto, kiuj staras unu post la alia:

Morgaŭ (1) *Maria* (2) *volus* (3) *legi* (4) *interesan* (5) *libron* (6) *en la ĉambro* (7) *kun Barbara* (8).

a) *Holnap* (1) *Mária* (2) *egy érdekes* (5) *könyvet* (6) *szeretne* (3) *olvasni* (4) *a szobában* (7) *Barbarával* (8).

- b) *Mária* (2) *Barbarával* (8) *szeretne* (2) *a szobában* (7) *holnap* (1) *egy érdekes* (5) *könyvet* (4) *olvasni*.
- D) La hungara vortordo povas esti diversa, kiu dependas eĉ de la aktul(ig)a emfazo de la frazo.
- E) Oni tradukas kelkajn diversajn prepoziciojn kaj finaĵojn tiel same; al hungaroj, ne pensantaj ĝuste esperante – tute egalas:
- preter, apud* (mellett)
 - sub, dum* (alatt)
 - kun, per* (-val, -vel)
 - al, en + akuzativo* (-ba, -be)
 - pri, de sur* (-ról, -ről)
 - pro, por* (-ért)
 - krom, ekster* (kívül)
 - sur, en* (-ban, -ben)
 - da, el* (-ból, -ből)
 - apud, krom* (mellett)
- F) Posedaj kaj personaj pronomoj povas esti uzataj en samaj formoj kaj antaŭ verboj kaj antaŭ substantivoj:
- (én) olvasok – mi legas, (az én) könyvem – mia libro.*
- G) En posedaj esprimoj la vortordo estas malsama: *Péter(nek a) virágai – la floroj de Petro; tiel same: la tagoj* (1) *de* (2) *la* (3) *semajno* (4) – *a* (3) *hét* (4) *napjai* (1). La prepozicio „de” egalas al *-nak, -nek*, sed ili estas, uzataj malofte, ne devige en tiu signifo.
- H) La verbo „havi” (+ akuzativo) ne estas uzata en la hungara lingvo. *Petro havas libron. – Péternek van (egy) könyve.* –nek egalas al prepozicio *de* en signifo poseda. (-e estas finaĵo de la posedaĵo.)
- I) Hungarlingvaj finaĵoj *-ra, -re* (*sur + akuzativo*), *-n, -on, -en, -ön* (*sur + nominativo*) en E-o havas signifojn „surface” kaj „surfacen”. En hungaraj vortformoj kaj esprimoj oni uzas nomitajn finaĵojn mi nomas ilin nur E-e): *somere, vintre, lunde, marde, je via sano, ĝis revido, por la morgaŭa tago, dekstren, en la universitato, en la koncerto, en la lasta studhoru, (veturi) al Budapeŝto, por ĉiam, (danci) sub la muziko, ĉasi fazanojn, je via dispono, duope* ktp. (Ekzistas centoj da ekzemploj!) Tiu „uniformigo” malfaciligas la ĝustan komunikadon de parolantoj hungare. (Salga 2008:31-32).

Konkludante: laŭbaze de menciitaj diferencoj inter la hungara lingvo kaj E-o kaj aldonante novajn datumojn, vidpunktojn, oni devas skribi kontrastan gramatikon, por ke la hungaroj povu paroli senerare, forigite/forgesite sian karakterizan hungaran pensmanieron.

Bibliografio

- Bokarjev, E. A. (1974): Fonemo kaj sono en Esperanto. En *Paco* (GDR).
- Kalocsay K. (1931): *Lingvo, Stilo, Formo*. Budapeŝto
- PIV = *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. 1970. Ĉefredaktoro: G. Waringhien. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda
- Salga Attila (1984): *A magyar nyelv az orosz nyelv tükrében* 'La hungara lingvo en la spegulo de la rusa lingvo'. Budapest
- Salga Attila (1985): Ni uzu ĝuste la vorton „ankaŭ”! En: *Debrecena Bulteno* 25.
- Salga Attila (1985): Ni uzu ĝuste la prepoziciojn por kaj pro! En: *Debrecena Bulteno* 26.
- Salga Attila (1993): Orosz Nyelvészeti Kislexikon 'Leksikoneto pri la rusa gramatiko'. Debrecen
- Salga Attila (2008): Eszperantó írásbeli vizsga 'Skriba ekzameno pri esperanto'. Debrecen
- Szerdahelyi István – Koutny Ilona (1996): Magyar–Eszperantó Kéziszótár. Hungara–Esperanta Meza Vortaro. Budapest: MESZ

SALGA Attila [ŝalga] (naskiĝis en 1945 en Tarnaörs) finis sian studadon en altlernejo kaj en universitato; doktoriĝis en 1975 pri slavistiko, estas emerita universitata docento lingvisto, ĵurnalist.

Li komencis instrui Esperanton en 1974; partoprenis en la Esperanto-movado kiel estro en diversaj departementoj de Hungario. Inter liaj libroj kaj eldonaĵoj estas vortaretoj (rusa–hungara, hungara–rusa, Esperanta–hungara, hungara–Esperanta), lingvistiktermina enciklopedieto, traktadoj pri gramatikaj sistemoj de Esperanto, de la hungara kaj rusa lingvoj, stilistiko, lernolibroj de Esperanto, E-krestomatio por studentoj pri filologio; eksterlande li prezentis kaj popularigis la historion kaj kulturon de rutenoj (rusinoj), vivantaj en Ukrainio. Li verkis romanojn, kaj laboris kiel ĵurnalistoj por urbaj, departementaj kaj centraj gazetoj de Hungario. Li estis ano de la redakta komitato de la iamaj *Budapeŝta Informilo*, *Debrecena Bulteno*, *Inform-trombono*.

En 1988 li laboris tri monatojn en Havano, kie li gvidis perfektigan kurson por kubaj E-instruistoj kaj E-rondestroj. Li preparas studentojn al la E-lingvoekzameno ekde 1999, kies ŝtatagnoska atestilo estas necesa por akiri diplomon en la hungaraj altlernejoj kaj universitatoj. (Esperanto kiel fremda lingvo ne estas deviga, sed estas elektebla postulo.) Attila Salga estas ano de ŝtatekzamena komisiono ekde 1985.

„Intur-lingvo”

Mi sonĝis, ke mi estis hungara turisto, kaj mi devis trapasi ekzamenon pri la internacia turisma lingvo („intur-lingvo”). Mi antaŭprepari min diligente, oni ja ne povis embarasi min per siaj demandoj.

Ni komprenis unu la alian facile.

– „Go’, hom’, tür’, okulare’ tas fenster, stoj ĉlovek, go’-go’, hop, plus fünf nulla forint – jonatan’ ŝampo’.”

– Tio signifas: „Homo, iru al la pordo, rigardu tra la fenestro, tie staras viro, iru al li kaj vi ricevos de li kvindek forintojn (HUF) por la pom-odora ŝampoo.”

– „Bravo! Trink pĵatj piva o’ne mani avangard cimner anti-super stol...”

– Kaj tio signifas: „Vi faris bone! Vi povas trinki tiujn kvin botelojn da biero, kiujn vi trovas sub la tablo en la antaŭĉambro.

— Gratulon, junulo, via inteligenteco estas akra.

– „Gratulire, junior, absolut ziĥer ponjemaj-spik’ maksimum.”

– Ho, kara amiko, tio ne estis traduk-frazo. Sed estas tute egale. Vi bonege faras, estas certe! Kaj nun ni vidu tradukon el la hungara lingvo al la „intura”. „La mopedon oni forprenos en la doganejo, aŭ oni devos pagi altan doganon.”

– Malenki motor vam-coll stop, kvazi capcara, kvazi minus multi super procent.”

– „Nur kelkajn varetojn ni kunportas, ĉar ni ne estas adeptoj de interŝanĝ-turismo, ni riĉiĝis en spirito eksterlande.”

– Malo-malo produkt, najn biznis-turist. Suvenir – ra’cio’.”

– „Se vi, estimata doganisto, ne traserĉas nian aŭtomobilon, mia bela vojaĝ-kunulino donos al vi hungareskan kison.”

– Niks atomboma aŭtomobil. Klass maŝina... Seksbomba sinjorina cupp-cupp ungariŝ-manier oficir.

– Bone, junulo, mi enskribas bonegan kvaliton. Mi petas vin propagi per gestoj, piedmovoĵ, per nia „intura lingvo”, ke la hungaraj turistoj devas trarompi la grandan muron de la komunikada krizo. Ju pli multe oni gestas, ju pli multe oni parolas „inturan lingvon”, des pli alte estas probable, ke tiu muro disfalos. Tiumomente unu la muroj komencis kliniĝi. Mi alkuris, kaj provis tutforte repremi ĝin, sed vane. Ĝi falegis sur min... Jen tio estis la poento de mia sonĝo, kaj la sama estas ankaŭ ĝia moralaĵo...

Attila Salga

Dekalogo por edzinoj

1. Estu ĵusbakita pano por via edzo, sed ne maron-kaĉo por li. Tiu ĉi kaĉo ja estas fajna, sed ĝi naŭzas, male, la pano estas ĉiam bezonata de ni. Sed ne plu forgesu ankaŭ tion, ke ne nur per pano vivtenas sin la viro.
2. Estu afabla kaj optimista. Pesimismo disigas la homojn, kaj ankaŭ via edzo estas ja... homo.
3. Estu pardonema pro bagatelaj pasioj de via edzo (ŝakludo, ĉasado, fiŝkaptado). Apliku la metodon de dekonsila instigo, tiel la venko de via edzo, laŭ lia stulta imago, pligraviĝos. Forta neado estigas malaprobos, eĉ, kontraŭdiras, kaj tio povas rezultigi disvolviĝon de aliaj, multe pli malutilaj pasioj.
4. Ne forgesu: se vi cedas pri bagatelaĵoj, viaj ŝancoj kreskas por tio, ke ankaŭ en grandaj aferoj vi rikoltu venkon. Permesu al via edzo, kel li mem elektu por si kompletan aŭ veturilon antaŭ ol ekiri al la laborejo. Trairu la ŝoseon tie, kie volas li, sed gvidu lin tien, kien iri volas vi.
5. Evoluigu en via edzo kapablon pri dommastruma inĝenieco, tiel eĉ la plej malgranda laboro farita de li pligrandigas lian fieron kaj instige efikas elkreski novajn ĝermojn de lia elrovemo. Se li mem, sola, malfermas la krakon de la varma akvo, pli volonte li vaz-lavos, ĉar tiu heroo faro memorigas lin pri tio, ke en la zenito de sia vivo li estas aktiva mati-artisto.
6. Estu aktiva helpanto en la help-agoj de via edzo. Estu utila por li, eĉ en aferoj ŝajne neutilaj. Notu por vi, ke najlo donita ĝustatempe en manon, kaj ĝustamomente eksonoranta ploro pro vido de fingro doloranta vian edzon, ĉio ĉi estas akvo al lia muelilo.
7. Nur moderne estu justa, kaj ne postulu pli multe al via edzo. Bona estas vero, sed feliĉo valoras pli multe.
8. En financaj aferoj apliku la teorion de socialista labor-divido. Cedu al via edzo la noblan devon de man-akiro, kaj prenu sur viajn ŝultrojn ĉian tedon de malnobla, malhonesta kaj vulgara malŝparado.
9. Evitu ĉeeston de via edzo, okaze de vest-aĉeto. Tiel lian nervosistemon vi savas de superfluaj ŝokoj.
10. Tie ĉi enskribu nepre tiajn aferojn, kiuj estas avantaĝaj por vi, ĉar per la ĉi-antaŭaj ordonoj vi povis konvinkiĝi pri maksimuma fetiĉigo al via mastro.

Attila Salga

/Tiun ĉi verkon de Attila Salga (A'tilla ŝalga) trad. T.P./

Numero 054 (decembro 1989)

Sándor Bonkáló kaj la orientaj slavo

(D-ro Attila Salga *)

ENKONDUKO

La nomo kaj verkaro de Sándor Bonkáló (ŝandor BONka'lo'; 1880-1959) estas malmulte konata eĉ en la rondo de hungaraj slavistoj – rusistoj, malgraŭ tio, ke li faris pioniran laboron en kelkaj branĉoj de la slavistiko. Mi mencias nur kelkajn el tiuj laboraĵoj de Bonkáló, kies valoroj estas respektintaj ankaŭ en la nuna tempo.

Li verkis la unuan (duvoluman) hungarlingvan libron pri la rusa literaturo, de ĝiaj komencoj ĝis 1924 (Az orosz irodalom története; „La historio de la rusa literaturo”; Athenaeum, Bp.1926). Ĝi estis plilarĝigita kaj iĝis detala kulturhistorio. Li skribis la unuan hungarlingvan monografion pri la historio, lingvoj, kulturo, vivmaniero de slavaj popoloj (A szlávok; „La slavo

Post tiu antaŭaĵo estas trafa la demando: se li estis eminentulo en la slavistiko, kial do oni ne konas lin, kial oni ne popularigas lian verkaron? Verŝajne, la leganto mem bone scias la historion de tiel nomataj „socialismaj” landoj (inter ili de Hungario), kies pasintaj 40 jaroj – stalinismaj kaj poststalinismaj – apartenas al la malbrilaj paĝoj de la pasinteco. Post 1945 estis ne nur malĝentile, sed ankaŭ malpermesite kaj danĝere mencii, ke la stalina reĝimo egalas al senhumana, nejusta, kripliga, sufoka, burokrata, kontraŭreligia rego-formo, en kiu ĉiun potencon havis sole la komunista estraro por ekspluati sian (rusan) kaj alinaciecajn popolojn. Neniu povis skribi pri tio, ke en Ukrainio ekzistas rutenoj, apartenintaj iam al Hungario. Sed antaŭ 1945 tion sincere konfesis kaj manifestis Sándor Bonkáló. La konkludon ni ĉiuj povas tiri: dum la poststalinisma/j/ reĝimo/j/ iu homo estis-restis „persona non grata” (persono ne dezirata).

Danke al novaj ventoj fluantaj kaj el Okcidento kaj el Oriento, la nunaj hungaraj sociaj cirkonstancoj ebligas eldiri la veron pri nia pasinteco, ni povas retaksi (valorrevizii) la okazintaĵon de niaj historio kaj kulturo.

** Pri Sándor Bonkáló (ŝandor BONka'lo') simila resuma studaĵo ĝis nun ne aperis en Hungario, nek alilande. La aŭtoro, d-ro Attila Salga, en la jaro 1975 defendis sian doktorecan disertaĵon universitatan. Nuntempe li verkas sian kandidatecan disertaĵon*

samteman. („La speguliĝo de la rusa, rutena lingvoj kaj kulturoj en laboraĵoj de Sándor Bonkáló.)

Pri la vivo de Sándor Bonkáló

Li naskiĝis la 22-an de januaro 1880 en la urbo Rahó (RAho'; nuntempe: Rahov en Ukrainio), kaj li lernis en grek-katolika gimnazio, poste en teologia liceo en Ungvár (Uĝgorod). Oni ne konsekris lin, ĉar li, fininte la liceon, komencis studi en la fakoj latina kaj germana de Universitato Péter Pázmány (PAZmanj') en Budapeŝto (1902).

Kiel mezlerneja profesoro li laboris en la urboj Gyöngyös (djendjeŝ), Szeged (seged), Zalaegerszeg (ZAlaegerseĝ), Budapeŝto.

Dume li perfektigis siajn studojn eksterlande (Leipzig /Lepsiko/, Petrogrado, Sofio). En la urbo, situanta sur la bordoj de la belega rivero Neva, li aŭskultis inter aliaj prelegojn de la famaj profesoroj Baudouin de Courtenay (bodŭen de kurt/e/ne'), (3), Ŝaĥmatov (4), Vengerov (5), Lavrov (6); kelkfoje li renkontiĝis kun la juna, tiam komencanta futurista poeto Majakovskij. En 1917 li ricevis diplomon pri la rusa lingvo. En marto 1919, laŭ invito de Oszkár Jászi (7), li komencis organizi en la budapeŝta universitato la katedron de la rutenaj lingvo kaj literaturo. Li prelegis ankaŭ ruse. En 1924 laŭ politikaj kaŭzoj (8) oni forigis, pensiis lin en lia 44-a jaro. Dum la 30-aj jaroj li ofte prelegis en la Hungara Radio pri diversaj eminentuloj, datrevenoj de la rusa literaturo.

En novembro 1945 li denove iĝis katedrestro de la ukrainaj lingvo kaj literaturo en Universitato Péter Pázmány. Iam li kritikis la kulturpolitikan de Ĵdanov (9), kaj li diris: „Verŝajne, en Sovetunio troviĝos malmultaj verkisoj, kies verkoj iĝos klasikaj, unikaj, se ili mem ne povas libere elekti la objekton kaj la metodon de siaj literaturaj verkoj.” La citadon Bonkáló mem mencias en sia aŭtobiografio, skribita en 1956, post la 20-a kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio, kiam li petis rehabilitadon, sed ne ricevis. Kaŝdenuncantoj akuzis lin pri kontraŭ-sovetismo ĉe Hungarlanda Federacia Kontrola Komitato. Oni interrompis lian karieron; la universitataj funkciuloj malpermesis al li prelegi, kaj la 21-an de aprilo 1950 li estis pensiata. Li mortis la 4-an de novembro 1959 pro apendicito.

La literatur-historiisto

Lia ĉefa verko Historio de la rusa literaturo (Az orosz irodalom története) aperis en 1926. Inter 1918 kaj 1924 li prelegis pri la tuta historio de la rusa literaturo en sia universitato, kaj li kompilis du-voluman libron el la plej interesaj kaj utilaj partoj de tiu. La verko estas sistemigita, sumigita, monografia, pionira laboraĵo, ĝi ĉie inde renkontis grandan interesiĝon de la kulturscivolema legantaro. Tiujn pensojn skribis Gyula Lazíczius (djula LAzisius), (10), aldonante, ke Bonkáló disvolvis la rilatojn inter la nova kaj malnova literaturoj kun granda intenco kaj kompetenco. Gyula Moravcsik (djula MORavĉik), (11), substrekis, ke en tiu ĉi libro la historio de la literaturo organike adaptiĝas al la tuta kulturhistorio de la rusa popolo. Sen priskribo de diversaj soviaj eventoj, religio, pensad-kaj emocio-manieroj de la rusoj oni ne povus kompreni eĉ la enhavon de literaturaĵoj, ĉar Rusio kun siaj unikaj aferoj por la eŭropanoj estas stranga, nekutima, neĉiutaga.

Preskaŭ samtempe estis eldonata alia verkaĵo pri la rusa literaturo (12). La aŭtoro István Szémán (13), (IŜTvan' SEman'), rigardas al la rusaj verkistoj tra la vitro de eklezia cenzuro, sed Bonkáló, la demokrato, konceptas, formuladas la tekston pli libere, reale. Szémán, uzis germanajn fontojn, kiuj estis ĝenerale kontraŭ-rusaj, kontraŭ-sovetiaj. En ambaŭ libroj ekzistas mankoj, miskomprenoj, malĝustaĵoj, tamen la laboraĵo de Bonkáló estas relative plena kaj preciza, eble pro tio, e li uzis hungar- kaj ruslingvajn fontojn, plejparte fidindajn.

En la 20-aj jaroj neniuj hungara burĝa kritikisto atingis tiun pozitivan kaj realan taksadon pri la klasika kaj nova rusaj literaturoj. Li unue klarigas al la hungaraj legantoj, ke la rusa literaturo komenciĝis ne ĉe A.S.Puŝkin, sed ĝi havas ĉ. mil jarojn. Ideoj de L.Tolstoj kaj F.Dostojevskij – la humanismo, verosento – en la rusa literaturo ne estas novaj, ĉar ili montriĝis jam en la mezepokaj verkoj. „La kulpinto pentas pro sia peko” ekzistas kaj en la diversaj literaturaĵoj (ekz.: „Kulpo kaj Puniĝo” de F.Dostojevskij, „Potenco de la mallumo” de L.Tolstoj, ktp.) En la malnova kaj nova literaturoj estas alia komuna karaktero – priskribo, figurigo de trompiĝintaj homoj (mezepokaj legendoj, 18-a jarcentaj sentimentalaj rakontoj, Onegin de A.Puŝkin, Peĉorin de Lermontov, Litvinov de Turgenjev, Ivanov de Ĉeĥov, Sergirius de L.Tolstoj, ktp.)

Post la bizanca alpreno, la pravoslava religio evoluis memstare, alprenante kelkajn paganajn elementojn, kiuj estis ĉefe spektroj, supernaturaj fortuloj. Ili estis multfoje priskribataj en literaturaj verkoj; ekz.: vodjanoj – satanaj demonoj de akvoj (Turgenjev: „Herbokampo Beĵin”, L.Tolstoj: „La muĵiko (= 'rusa kamparano' – A.S.) kaj vodjanoj”; rusalka – spirito de tiuj virinoj (fraŭlinoj), kiuj mortis perforitaj (Gogol: „Nokto en Majo”, Puŝkin: „Rusalka”, Turgenjev: „Herbokampo Beĵin”, Peĉerskij: „La mondo arbara”, Maksimov: „Arbara angulo”, ktp.)

Bonkáló ĝuste konstatas, ke komence la religio, scienco kaj poezio de ĉiu popolo formis unuecan, kompleksan tuton, kiel, ekzemple, eposoj de la helena Homeros. Krom tio, la rusa popolpoezio manifestas ĉiam veron. Kiam li priskribas la kutimojn, festojn, sociajn popolajn ludojn, li detale ilustras ilin per siaj tradukoj. Poste sekvas magiaj, ĉarlatanaj tekstoj, versoj, eposoj (ruse: bilina), historiaj, religiaj, rabistaj kantoj, fabeloj, proverboj. La nova tipo de la popolkanto siatempe estis „ĉastuŝka”. Tiuj kantoj kaj ĝiaj tekstoj estis verkataj komence dum la revolucio en 1917 kaj poste seninterrompe. Por havi almenaŭ imagon, ni konatiĝu kun unu el tiuj urbaj-vilaĝaj kantoj:

„Antaŭe mi estis kuiristo,
Kaj mi fritis rijetojn,
Nun mi estas komisaro,
Kaj mi skribas dekretojn.”

(Multaj el ni kantis similajn kantojn, verkitajn en la 50-aj jaroj laŭ „ĉastuŝka-modo”, tiel ni mem povas malalte taksi ilian „valoron”!)

La malnovan literaturon li disigis je kvar etapoj.

1. Li rimarkas ĝuste, ke la kijeva etapo estis ankoraŭ tiel nomata orientslava (988-1240).
2. Post la tatara ekstermo sekvis la feŭdala dispartiĝo, sed la aŭtoro ne mencias la

literaturon florintan en diversaj princaj teritorioj (Moskva, Tver, Smolenak, Pskov, Haliĉ, Ĉernigov, k.a.), li priskribas nur la literaturan vivon en Suzdal.

3. Epoko de unuiĝintaj princaj teritorioj (ekde la mezo de la 15-a jarcento ĝis la fino de la 16-a jarcento).

4. La epoko de la unueca literaturo (17-a jarcento).

(daŭrigota)

REFERENCJOJ

1 **Ruteno** – ano de ĉefgento en la sud-okcidenta teritorio de Karpatoj, en la tiel nomata historia (granda) Hungario. Ekde la packontrakto en Trianon (Versailles / Versajlo), la 4-a de junio 1920 tiu estinta parto de Hungarlando apartenas al Ukrainio. Rutenoj parolis (-as) sian dialekton de la ukraina lingvo.

2 **A rahói kisorosz nyelvjárás leíró hangtana**. (La deskripta fonetiko de la malgrand-rusa /komprenu: rutena – A.S./ dialekto en la urbo Rahó.), Gyöngyös, 1910 – A magyar rutének. (La hungaraj rutenoj.), Bp., 1920. – A kárpátaljai rutén irodalom és művelődés. (La rutenaj literaturo kaj klerigo en Subkarpatio.), Pécs, 1935. – A rutének. (La rutenoj.), Bp., 1940.

3 **A. S. Baudouin de Courtenay** (1845-1929), rusa-pola lingvisto, ano de Peterburga Scienca Akademio. Li okupiĝis ĉefe pri fonetiko-fonologio.

4 **A. A. Ŝahmatov** (1864-1920), filologo, akademiano. Li havis multbranĉan verkaron. Pioniro en la tekstologio kiel scienco.

5. **S. A. Vengerov** (1855-1920) literatur-historiisto, verkis monografiojn kaj bibliografiaron de rusaj verkistoj.

6 **P. A. Lavrov** (1856-1929), filologo-slavisto, akademiano. Li okupiĝis ĉefe pri la historio de la slava literaturo kaj la slavaj lingvoj.

7 **Oszkár Jászi** (Oskar' jasi; 1875-1957), dum la reĝimo de Mihály Károlyi (MIhaj' KAroji; 1875-1955) li estis subministro respondeca pri la naciecaj aferoj.

8 **Bonkáló** komencis labori en la universitato tiam, kiam M. Károlyi (KAroji) estis la prezidento en Hungario. Lia nomumo kiel katedr-estro estis nuligata, ĉar oni akuzis lin pri bolŝevisma propagando. – Vidu: Attila Salga (a'tilla ŝalga): „Adalékok Bonkáló Sándor életéhez és munkásságához.” (Indikoj al la vivo kaj verkaro de Sándor Bonkáló). Acta Academiae Pedagogiae Agriensis – Nova Series, tom XII, Eger, 1974, 203.

9 **A. A. Ĵdanov** (1896-1948), sovetia politikisto, havinta ĉefan rolon en la kultura vivo de SSR, disvastiganta sektajn-dogmajn teoriojn kaj postulojn en la sovetia kulturo.

10 **Gyula Lazícius** (djula LAzicius; 1896-1957), lingvisto, universitata profesoro. Vidu: Bonkáló Sándor könyve az orosz irodalomról (Libro de Sándor Bonkáló pri la rusa literaturo). Nyugat, 1926., II.153. Vidu ankoraŭ: Attila Salga (a'tilla ŝalga): Nemcsak kuriózum, forrásmű is. (Ne nur kuriozaĵo, sed ankaŭ fonto). Hajdú-Bihari Napló, 1983.08.11.

11 **Gyula Morvacsik** (djula MORavcik; 1892-1972), akademiano, historiisto. Vidu: Orosz irodalom (Rusa literaturo), Napkelet, 1926.578.

12 **Az újabb orosz irodalom a régi irodalom történetének vázlatával**. (La pli nova rusa literaturo kun la skizo pri la historio de malnova literaturo.) Bp.1926.

13 **István Szémán** (IŜTvan' SEman'; 1880-1961), papa prelato, akademiano de Akademio „Sankta Stefano”.

Lernu Esperanton!

Malavantaĝoj	Avantaĝoj
<ul style="list-style-type: none">• vi devas lerni• eĉ 3 kajer-paĝojn vi devas plenigi per ĝia gramatiko• kiu foje eksentas ĝian specifan logikon, tiu ne povas deĉutimiĝi• ĝiaj deklinacio kaj konjugacio estas neellerneblaj• ĝi estas ne escepta lingvo• ĝia vorttrezoro estas ne individua, sed internacia• ĉiulande troviĝas esperantistoj; mi ne havas sufiĉan monsumon por vojaĝi tien• oni povas multe legi en tiu lingvo• videvas (ĉu devas?!) trapasi lingvoekzamenon	<ul style="list-style-type: none">• ĝi estas multe pli facile alproprigebla ol aliajn naciaj lingvoj• ĝia gramatiko estas simpla, por ĝi sufiĉas nur 3 kajer-paĝoj• laŭ la logiko de la lingvo novaj vortoj estas elformeblaj memstare, sen vortaro• ĝi ne havas deklinacion, nek konjugacion• ĝiaj 16 reguloj ne havas esceptojn• antaŭ la komenco de la studo vi jam konas pli ol 1.000 vortojn• ĝi estas nenies gepatra lingvo. pro kio ne elformiĝas en la parolanto interna komplekso• interŝanĝaj vojaĝoj. internaciaj programoj kun rabatoj. konferencoj. senpagaj tranoktejoj - baze de „esperantista altruismo”• vi povas legi, publikigi en 80 landoj; la kono de Esperanto, la „esperantista vivsento” liberigas energiojn vi povas trapasi ŝtatan lingvoekzamenon; oni akceptas ĝin por kandidatiĝo

Numero 059 (junio 1990)

Sándor Bonkáló kaj la orientaj slavoj

(daŭrigo)

„Ili neis formojn kaj enhavon de ĝisnuna poezio, interrompis la interrilitojn kun la tradicio, kaj ili serĉis novajn idealojn, diojn.” (24) Bonkáló simple konstatas, kiel siatempe preskaŭ ĉiuj rusaj kaj germanaj kritikistoj, ke tiuj poetoj iĝis formomajstroj – kelkaj el ili (Brjušov, Blok) konsentis opinion de bolŝevistoj.

Bonkáló en la ĉaptiro Aliaj verkistoj de la dideka jarcento (II. 187-193) alte taksas la literaturaĵojn de I.A.Bunin (1870-/1953*/). En siaj rakontoj li malfermas reale la korpajn kaj animajn malbonaĵojn de kamparanoj; liaj poemoj estas pentritaj de belegaj bildoj pri la naturo, de elegia humoro pro la pereigintaj vilaĝoj. Kiel novrealisto, li iras ĉiam sur la vera, ĝusta vojo, ne hazarde, ĉar li estas daŭriganto de la klasika rusa literaturo. La literaturhistoriisto detaligas ankaŭ la verkaron de A.I.Kuprin (1870-/1938*/), M.M.Priŝvin (1873-/1954*/), S.S.Sergejev-Censkij (1875-/1958*/) k.a.

Pri la historio de la revolucia literaturo li skribas: „En la socio de bolŝevismo oni volis estigi kolektivan arton, beletron. Oni fanatike detruas la malnovan rusan literaturon. Ĉar la laboristaro estas organizita laŭ la principo de kolektivismo kaj sindikato, la bolŝevistoj pensis, ke ili devas „konstrui” surbaze de tiuj ideoj. Sed tio estas utopio; ĉu oni povas mortigi en la homo la homan „mem”, lian personecon, la eternan sopiron por la beleco, ĉu oni povas direkti el iu centro la laboron de verkistoj kiel funkciadon de iu fabriko? Tamen en la literaturo malaperas „mi” kaj envenas „ni”. Tiel nomataj oficialaj verkistoj laŭvice „faris” laboraĵojn de kolektiva literaturo – vane, ĉar tiuj rakontoj ofendas la guston de la plej simplaj kamparanoj kaj laboristoj.” (25) „La soveta reĝimo kaj la bolŝevisma partio ŝatas kaj apogas t.n. proletan literaturon. La verkisto proletara estas apostolo de bolŝevismo. La blinde agadas laŭ la instrukcioj de sia partio, kaj li atakas verkistan liberecon kun senindulga malamikeco. Tiuj proletaj verkistoj ĝenerale estas gefiloj de proletaj gepatroj. Tamen ilia „fameco” estas certigita ne pro tio, sed pro la proleta kulto, animo de iliaj verkoj. Ilia kredo estas agitado, propagando kaj la organizo al popolamasoj.” (26)

„La verkistoj estas sklavaj birdoj, kiuj kantas en kaĝoj. Tiuj verkistoj propagandas mision mondhistorioan de sia nacio, kio signifas, ke bolŝevistoj volas fari en la tuta mondo revolucion, do subjugi la tutan mondon: kio egalus al la morto de la okcidenta civilizacio kaj la homa libereco.” (27)

En la lumo de „perestrojka” oni jam ne povas admiri tiujn vortojn de Bonkáló, ĉar en diversaj presaĵoj estis publikigataj similaj opinioj, spegulantaj la tiaman situacion. Tamen oni povas admiri, ĉar Bonkáló ĉi-kaze anticipis nin. Estas konsekvenca la daŭrigo de Bonkáló-opiniaro: „La rusa verkisto estas nek verkisto, nek genio, sed li estas simpla metiisto. Liajn laboraĵojn kontrolas cenzoroj. Se ili ne konvenas al la principoj de la

partio, ili ne eldonas ilin, krome, la prokuroraro akuzas la verkiston pro la kontraŭsoveta propagando.” (28)

Kontraŭ la stalinismo

Estas interese citi la laboraĵo de Bonkáló, en kiuj li akre kritikas la sovetan reĝimon ne nur rilate ĝian literaturan konceptaron, sed rilate al nacieca politiko, kontraŭreligia propagando, homaj rajtoj.

„Stalin mem kun sia brutala teroro kaj malvalidigo de la plej sanktaj homaj rajtoj diskreditas la komunismon. Anstataŭ la promesita bonstato kaj feliĉo li certigas al la laboristoj la plej grandan malriĉecon, puŝas ilin en mizeron, sklavecon.” (29)

Pri la naciecaj problemoj li skribas: „En la manifesto, subskribita de Stalin kaj Lenin la 15-an de novembro 1917, estas deklarita:

1. Ĉiu nacieco en Rusio egalas kaj estas suverena.
2. Popoloj de Rusio libere disponas pri sia sorto; ili povas eĉ departiĝi kaj fondi memstaran ŝtaton.
3. Ĉesas iu ajn kaj ĉiuspeca malhelpo de naciaj kaj religiaj privilegioj.
4. Oni certigas la liberan evoluon por ĉiu nacieco vivanta sur la teritorio de Rusio.

Tiu ĉi deklaro do estus devinta malfermi novan epokon por la popoloj vivantaj en Rusio...Tamen okazis nur tio, ke ŝanĝiĝis la metodoj de la carisma nacieca politiko, sed la enhavo mem restis senĉesa. La respublikoj havas nek unu suverenan rajton, ĉar laŭ la konstitucio de la jaro 1936, ĉiu rajto pri suvereneco apartenas al la komuna registaro de Sovetunio (vidu la 14-an punkton de la konstitucio!). Al la rajtoj de la moskva reĝimo apartenas: subskribo de ĉiuj internaciaj kontraktoj kaj interkonsentoj, afero pri la paco aŭ milito, fondo kaj aniĝo de novaj respublikoj, plenumo de la sovetia konstitucio, precizio de limoj inter respublikoj, fondiĝo de novaj distriktoj, departementoj, aŭtonomaj respublikoj sur la teritorio de Sovetunio, komandado de la tuta sovetia armilaro, tutlanda kaj ekstera budĝeto kaj budĝetoj de respublikoj, ĉiu branĉo de financaj aferoj; bankoj, entreprenoj, fabrikoj, uzinoj, institucioj, transporto, poŝto, fervojo, telefono, radio ktp. Ni devas ankoraŭ aldoni, ke laŭ la unua artikolo kaj ĝia sesa punkto apartenas al la sovetia reĝimo eĉ mineraloj, akvoj, arbaroj, maŝinoj, traktoroj ktp. Nun vi ne demandu, kion havas diversaj respublikoj. La respondo povas esti nur: ili havas nenion, tamen la soveta reĝimo konstante deklaras memstarajn naciecajn rajtojn de siaj respublikoj. Estas prave, ke iu respubliko havas nur tiom da memstareco, kiom havas niaj departementoj.” (30)

Bonkáló konkludas, ke la ruĝa caro Stalin volis fari el naciecoj ian konglomeraton, kiun li nomas „sovetaj homoj”.

Li skribas, ke la diktaturo de Stalin venenas la tutan vivon de sovetiaj homoj, eĉ de komunistoj. Dogmismo, burokratismo, teroro, sklavigo, diktaturo, koruptado, alkoholismo, seniluziigo – jen estas „rezulto” de falsaj stalinismaj ideoj.

Bonkáló protestas, ke bolŝevistoj subigas ĉefe kredulojn, ĉar la ruĝuloj estas kontraŭ la religio. Ili arestas pastrojn, kredulojn, fermas preĝejojn aŭ transformas la sanktejojn je naĝejoj, kulturdomo, ĉevalejo, dancejo, grengardejo, kinejo, klubejo. Tamen la registaro

ne konfesas sian kontraŭan agadon. Ĝi misinformas eksterlandanojn dirante, ke la popolo mem fermas siajn preĝejojn. „Ne kredu al ili, al la bolŝevistoj! Ĉu vi povas imagi, ke la popolo mem postulas la fermon de la preĝejoj en tiu imperio, kie el cent milionoj da plenkreskuloj komunistoj nombras nur unu milionon, sed inter ili estas nur sescent miloj da ateistoj?

Ĉu estas vere, ke mem la laboristoj proponas iom da procentoj de siaj salajroj por la evoluo de industrio, ili petas „seniandajn tagojn“, labori eĉ sabate kaj dimanĉe?...

La metodo estas tute originale priprezenta. La anoj de la registaro povas ĉiam apelacii al la peto de kamparanoj kaj laboristoj /al la neekzistantaj petoj!/, kaj ili devas ĉiam plenumi tiujn petojn, ĉar la registaro mem estas kamparana-laborista.” (31)

D-ro Attila Salga

(daŭrigota)

REFERENCJOJ

24 S. Bonkáló: Az orosz irodalom története (Historio de la Rusa Literaturo), II.173

25 Samloke, 194-195

26 S. Bonkáló: Képek a szovjetorosz irodalmi életből. (Bildoj el la sovetrusa literatura vivo) Katolikus Szemle, 1931.679.

27 S. Bonkáló: A cári Oroszország útja a bolsevizmus felé. /La vojo de la cara Rusio al la bolŝevismo/, Katolikus Szemle, 1932.350

28 S. Bonkáló: Gogoly realizmusa és a mai szovjetorosz realizmus. /Realismo de Gogol kaj la nuna sovetrusa realismo/, Katolikus Szemle, 1935.559.

29 S. Bonkáló: Szovjet-Oroszország. /Soveta Rusa/ Recenzo pri la libro de Panait Istrati „Vers l'autre flamme” I-III. Paris, 1929, Budapesti Szemle, 1930,317.

30 S. Bonkáló: Nemzetiségi kérdés a Szovjetúnióban /Naciecaj Demandoj en Sovetunio/, Katolikus Szemle, 1940,28-29.

31 S. Bonkáló: A vallás és az egyház Szovjet-Oroszországban. /La religio kaj eklezio en Soveta Rusio/, Katolikus Szemle, 1930.424.

(daŭrigota)

Numero 059 (junio 1990)

Indekso de Esperanto-periodaĵoj

(troveblaj en la legoĉambro de la urba biblioteko de Debrecen
/strato Béke, numero 18/

(ne kompleta!)

1. ANTAŬEN (Gazeto de Hungaraj Esperantistaj Laboristoj), 12 n-roj, 1929-32; 2. ANTAŬEN (franca), 1934-36; 3. BUDAPEŝTA INFORMILO, 1971-1989; 4. BULGARA ESPERANTISTO , 1965-1979; 5. BULTENO (ĉeĥoslovaka), 1957-59; 6. BULTENO (hungara eldonaĵo de Tutlanda Konsilantaro fervojista), 1964-1976; 7. BULTENO DEN IFEF (aŭstra gazeto fervojista), 1964-1976; 8. DEBRECENA BULTENO, 1982-1988; 9. DIA REGNO (nederlanda), 1966-1968; 10. LA ESPERO EL KOREUJO , 1984-1987; 11. EL POPOLA ĈINIO, 1984-188; 12. DER ESPERANTIST (GDR), 1982-1983; 13. ESPERANTO, 1956-1973, 1978-1984; 14. LA ESPERO (sveda), 1947, 1948, 1954, 1955-56; 15. ESZPERANTÓ MAGAZIN, 1973-1977; 16. FERVOJISTAJ NOVAĴOJ (aŭstra), 1984-1987; 17. FINNA FERVOJISTO, 1957-1969; 18. LA GLUMARK-KOLEKTANTO (eldonaĵo de internacia klubo kolektanta Esperanto-materialojn), 1956, 1966, 1967, 1968; 19. HEROLDO, 1926-1983; 20. HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO, 1970-71, 1985; 21. HUNGARA ESPERANTISTO, 1961-1973; 22. HUNGARA FERVOJISTA MONDO, 1957-1988; 23. HUNGARA VIVO, 1961-1988; 24. INFORMA BULTENO (itala), 1977; 25. INFORMILO DE INTERNACIA ESPERANTO-MUZEJO, 1970-1974; 26. INTERNACIA FERVOJISTO (aŭstra), 1961-1978; 27. INTERNACIA JURA REVUO, 1948-1949; 28. JUGOSLAVIA FERVOJISTO, 1960-1973; 29. JUNA AMIKO, 1974-1983; 30. KOOPERATIVA STELO, 1986-1987; 31. LA MEVO, 1982-1984; 32. MONATO (belga), 1983; 33. NORDA PRISMO, 1966; 34. NUNTEMPA BULGARIO, 1959-1970; 35. PACO (bulgara), 1958-1973; 36. POLA ESPERANTISTO, 1967-1971; 37. LA PRAKTIKO (nederlanda), 1935-37, 1954-58; 38. RIPOZO (bulgara), 1965-1974; 39. SAKSA KURIERO (Leipzig), 1986; 40. SAVARIA E-REVUO, 1985-1987; 41. SCIENCA MONDO (bulgara), 1981, 1986; 42. SENNACIULO (Roterdamo), 1947-1965; 43. STARTO (ĉeĥoslovakia), 1969-1974; 44. LA STUDA STELO (Jugoslava), 1957-1970; 45. TEKINTET, 1988; 46. VERDA VOJO (Miskolc), 1956-1959; 47. VILÁG ÉS NYELV, 1978-1987

kompilita de **Attila Salga**

Numero 060 (septembro 1990)

Sándor Bonkáló kaj la orientaj slavo

(daŭrigo)

La rutena (ukraina) temo en lia verkaro

En 1940 oni skribas pri Bonkáló: „Li estas unu el la malmultoj, kiu parolas la rutenan lingvon, eĉ science studas ĝin. Lia eminente bazigita ukraina kaj rusa lingvoscio estis utiligita de hungaraj oficialaj organoj postmilita, sed precipe nuntempe, post la religieciĝo de Subkarpatio. Lia scienca prepariĝo estas grandega valoro por nia lando. Li verkis tutan aron de laboraĵoj, kiuj traktas rutenajn problemojn...” (32)

Lia libro La rutenoj (Franklin-Társulat, Bp.1940) ekde 1945 ĝis la komenco de 1989 estis tiel nomata „fermita verko”, oni do povis legi ĝin nur laŭ speciala permeso. Anstataŭ detale priskribi lian rutenan (ukrain-lingvan) sciencan agadon, mi prezentos tiun libron, kiu ĝenerale kaj verŝajne donos al vi konvenan imagon pri lia tiutema verkaro. (Rimarkinde estas, ke lia filo, Ervin Bonkáló, tradukis tiun libron en la anglan lingvon, kaj ĝi aperos en Kanado supozeble en 1990.)

En la unua ĉaptiro de la libro Bonkáló pravas, ke la rutenoj en Subkarpatio ne estas praloĝantoj; ili translokiĝis (estis invitataj de sur la norda kaj nord-orienta deklivoj de Karpatoj(Haliĉ, Podolina, Bukovina, Galicia) por labori en la 13-a ĝis 15-a jarcentoj. Tion konstatis ne nur li en la ukrainistiko, sed ankaŭ sovetiaj fontoj konstatis, ke Subkarpatio apartenis al la Kieva Princlando dum la 10-a kaj 11-a jarcentoj, do ĝiaj loĝantoj estis slavo, kaj en la 11-a jarcento la hungaroj okupis tiun teritorion. Bonkáló refutas, detale kaj science, ke slavo ne povis esti praloĝantoj en Subkarpatio.

Rutenoj dividiĝas je ebenaĵ-loĝantoj (hungare: síklakók) kaj mont-loĝantoj (hungare: hegylakók). La ebenaĵ-loĝantoj similas al hungaroj laŭ siaj loĝejo, vesto, vivteno, vivmaniero (Técső-/ukraine kaj ruse/-Tjaĉiv-Tjaĉev; Huszt-Hust-Hust; Nagyszőlős-Vinogradiv-Vinogradov; Beregszász-Beregovo-Beregovo; Munkács-Munkaĉeve-Munkaĉevo. La mont-loĝantojn oni povas dispartigi je huculo (hungare: hucul), bojko (hungare: bojgó) kaj lemko (hungare: lemkó). Huculoj loĝas ĉe la fonto de la rivero Tiso (Körösmező-Jasinja-Jasinja; Rahó-Rahiv-Rahov; Kaszony-Kosini-Kosini ktp.) Huculoj ĝenerale iĝis eminentaj flosigistoj, arbar-laboristoj. Laŭ fontoj de slavisto ilia nombro en 1939 estis 30 miloj. Inter ili estis iam famaj „betjaroj” (rabistoj), ekz. Ivan Prislivij (1703), Pinta (1704), Oleksa Dovbus (1738-44).

Iliaj popolvestaĵoj estas tre interesaj. Viroj portas saktolajn (stuptolajn) nigrajn aŭ ruĝajn pantalonojn. Somere ili surhavas senmanikajn, riĉe ornamitajn bekeŝojn al ŝafida peltó (koĵuĥ) aŭ stuptolajn nigrajn, ĝisgenuajn surtutojn el ŝafida (ŝafa) ledó (ködmön, serdak). Ili tre ŝatas brilantajn ornamaĵojn, monerojn, butunojn. La zono de huculo

(tűsző) estas lia fieraĵo. Ĝi estas 25-30 cm longa, farita el led, en ĝi li portas siajn tranĉilon kaj ponardon.

La vestoj de virinoj estas ĝismaleola ĉemizo kun antaŭ- kaj malantaŭ-tuko el dika brodaĵo. Ili portas rimensuojn. Festotagojn la riĉulinoj portas botojn, ĉirkaŭ ili kolo estas belaj rubandoj kun perlomodela brodaĵo.

Bojkoj loĝas en Verhovina (Vihorlat, Beskid). Ĝenerale huculojn oni nomas „fieraj aristokratoj” kaj la malriĉajn bojkojn oni devas nomi „veraj demokratoj”. Hucul estas moknomo (rumane: huc-ul, hu-cul, ‘rabisto’), tiel same bojko (rutene: bojkij, ‘lerta’, ‘vigla’ aŭ boje, ‘tiel estas’). Bojkoj komence bredadis, sed iliaj vivkondiĉoj malriĉiĝis; ekde la 16-a jarcento ili iradis rikolti al la Granda Ebenajo.

Bonkáló eksterordinare kolore priskribas tiujn partojn. Oni povas tuj senti liajn riĉegajn spertajn sciojn, kulturitecon, klerecon pri tiu temo. Li gvidas la legantojn al la ĉeheimaj ŝpinejoj, mondo de la popolfabeloj kaj –legendoj; li prezentas patruj-amon de la bojkoj, detaligas iliajn tradiciojn, loĝejojn, malriĉajn bienetojn.

Lemkoj loĝas okcidente de bojkoj, sur la montaro situanta inter la rivero Latorca kaj la urbo Poprad (nuntempe ĝi apartenas al Slovakio). Ilia moknomo devenas el la vorteto lem(len), kiun ili uzas anstataŭ liŝ (‘nur’). En la popolkantoj kaj –fabeloj de la haliĉaj lemkoj estas nimataj hungaraj urboj, inter aliaj plej ofte oni mencias la nomon de Debrecen, ĉar lemkoj iradis rikolti ĉefe al la departemento Hajdú. La rutenan dialekton de la lemkoj influis polaj vortoj. Komence ili vendis-aĉetadis ĉevalojn, bovojn, ŝafojn, porkojn, sed en la mezo de la pasinta jarcento ili estis „elpuŝitaj” de bonhavaj judoj.

Ilia opiniaro kaj pensado estas pli proksimaj al Okcidento ol tiuj de huculoj kaj bojkoj. La viroj ne portas zonon (tűsző), sed surhavas kravaton. Ilia vesto konsistas el kurta, faldita „kalsonego”, „gatjo” (gatya) kaj ĉemizo ku nigra veŝto, super ili – longa mŝn (serdak – ĝisgenua bruna vestaĵo). La virinoj surkape havas nigrajn aŭ bluajn tukojn, la fraŭlinoj iras kun nuda kapo. Iliaj jupoj estas unukoloraj.

Poste Bonkáló detale priskribas la historion de la rutenaj literaturo kaj kulturo. Li tre bedaŭras, ke ankoraŭ ne elformiĝis la rutena literatura lingvo (surbaze de la rutena popola lingvo, ĝiaj dialektoj – rim. de A.S.). La verkistoj, intelektuloj anstataŭ tiu ĉi kreado disipas siajn talentojn, ĉar ili disputas nur pri tio: ĉu rutenoj estas ukrainanoj, ĉu rusoj, poloj, slovakoj? (Laŭ opinio de la slavisto ili estas „hungaroj” en tiu senco, ke ili loĝis multajn jarcentojn en Hungario, en iliaj dialektoj amase troviĝas hungardevenaj vortoj, laŭ sia patruj-amo kaj historio ili apartenas al la granda historia Hungarlando – rim. de A.S.).

Bonkáló skribas, ke la rutena literaturo elformiĝis de la 17-a jarcento. El tiu vidpunkto havis grandan rolon la eklezio, religio. La influo hungara estas rimarkebla en diversaj

poemoj, verkaĵoj polemikaj pri religio, kantoj, fabeloj, legendoj. La pastroj mem estis ne nur servistoj de la Dio, sed ili instruis sian popolon. La slavisto kontraŭstaras la t.n. rusan kaj ukrainan agitadon, li, do, opinias, ke „niaj” rutenoj ne bezonas influon ruslingvan kaj ukrain-lingvan.

Ĉiu ĉaptiro, en kiu li analizas la tiutempan situacion de la grekokatolika eklezio en Subkarpatio (kaj aliloke) estas unikaĵo el historia vidpunkto. Fine li detaligis tiujn agojn, pere de kiuj la tiama hungara registaro helpis al la popoloj en Subkarpatio (apartenanta al Hungario ekde la 2-a de novembro 1938 ĝis 1944 – rim. de A.S.).

Ĉiuj aliaj laboraĵoj de Bonkáló – lingvistikaj, historiaj – havas grandan valoron kaj traktas specialajn temojn. (33)

Pri la tradukarto de Bonkáló

Oni konas kelkajn difinojn de la vorto „traduko”. Ĉefe estas malfacile esprimi kaj konkretigi la esencon de literatura traduko. Inter tiuj difinoj ekzistas eĉ tiel ekstremaj, unikaj kaj samtempe humuraj kiel vortoj de Erő Osváth (ERne’ OŜvat’), (34), iĝintaj aforismo: „La literatura traduko ne havas sian teorion – nur historion.”

Laŭ mia opinio, literatura traduko estas transdono, transpozicio de fremdlingvaj versoj, romanoj, noveloj, dramoj, eseoj ktp. laŭenhave, laŭforme precize, arte kaj egalvalore al alia lingvo. La postuloj de bona traduko estas: a/ kompreno de la fremdlingva teksto, b/ ĝia precize interpreto, c/ altkvalita scio de la fremda kaj gepatra lingvoj, d/ artnivela akomodiĝo al la pensaro de la verkisto kaj al la atmosfero de la literaturaĵo mem. Brila scio de paronimoj, antonimoj, sinonimoj, humoro de diversaj vortoj kaj stiloj, konstruado de frazoj, alineoj, kapablo-havo pri ĝusta vortordo kaj esprimriĉa, enfaza vortuzado – jen kelkaj akcesoraĵoj kaj sekretoj de bona tradukaĵo.

Kiel Bonkáló opiniis pri tiu temo? Ĉu la literatura traduko egalas al iaspeca reverkado? La tradukisto jesas al tiu demando. „Bedaŭrinde – li skribas - , la ĉarmon kaj freŝecon de Jevgenij Onegin (romano en versoj de A.S.Puŝkin – rim. de A.S.) oni ĝis nun ne povis traduki, ĉar ne estas tradukeblaj dialektismoj, la atmosfero speciala de la verkaĵo; iun literaturan verkon oni devas refari, redoni ĝin al la legantoj en tiuj formo kaj stilo por ke ili ne pensu pri iu „fremda” aŭtoro, sed ili pensu, ke ĝi estas skribita nacilingve.” (35)

Li tradukis multe. (36) Lia plej granda laboro estas L.Tolstoj: Háború és béke (Milito kaj Paco) en la eldono de Gutenberg (1928-29) en 11 volumoj. Ĉu vi povas imagi la grandecon kaj malfacilecon de tiu ĉi tradukado?

Por havi ekzemplon pri la stilo tradukarta de Bonkáló, mi komparos lian tradukaĵon kun laboraĵoj de Dezső Ambrozovics (DEĵe’ AMbrozoviĉ), (1907), (37) kaj Imre Makai (MAkai), (1954), (38). Mi konstatas, ke ne ekzistas diferencoj laŭ la enhavo (fideleco al la originalo estas la plej grava postulo!). Laŭstile en ĉiu tradukaĵo oni povas senti, malkaŝi tiujn propraĵojn, kiuj apartenas nur al la persona stilo de la tradukisto

(sinonimoj, antonimoj, vortordo, kunmeto de frazoj aŭ dispartigo de longaj pluroble kunmetitaj frazoj je pli simplaj, refondiĝo de atmosfero de la romano ktp.). La plej malnova laboraĵo apartenas Ambrozovics, tio signifas, ke li uzas, rilate al nia nuntempa literatura lingvo, iom strangajn, malnovtempajn frazojn, vortordojn kaj vortformojn,. Li ĝenerale „fiksas” la originalajn ruslingvajn frazstrukturojn, tiel lia stilo ne estas sufiĉe hungarlingva. Bonkáló estas multe pli kuraĝa: li ne persistas ĉe strukturoj, kiuj ne estas karakterizaj por nia nacia lingvo, li hungarigas ilin, kunmetas kaj dispartigas la frazojn libere – sen la ŝanĝo de la enhavo. Estas surprizo por la leganto lia kapablo elekti la plej konvenajn sinonimojn, vortordon. Lia tradukaĵo, do, post 60 jaroj estas valora kaj moderna. Makai kompreneble verkis en nia nuntempa literatura lingvo. Ankaŭ li ne tradukas laŭfaze, ankaŭ li estas kuraĝa, sed ofte troe ŝanĝas teksterojn. Tiel li interrompas la internan ritmon de originalaj frazoj.

Mi tute ne diras, ke inter tiuj tradukaĵoj povas esti unua-, dua- kaj tria-grada. Ĉiuj ili estas grandegaj reverkaĵoj – faritaj kun egaj forto kaj scio, eminenta talento.

XXX XXX XXX

En mia studo mi intencis doni al la legantoj informojn pri la vivo kaj malinde forgesita verkaro de Sándor Bonkáló. Verŝajne mi povis enrigardigi vin al kelkaj paĝoj kulturaj kaj historiaj de Hungario antaŭ 45-80 jaroj.

Fine jen kelkaj faktoj, kiuj reprezentas kaj pravas la valoron de lia verkaro. En Usono en „Rusyn Research Institute” oni rememoris festene la centjaran datrevenon de lia naskiĝo (1980). En Uppsala (Svedio) oni aranĝis similan rememoran solenaĵon. En Universitato Toronto (Kanado) en la katedro de la ukrainaj lingvo kaj literaturo sur la muro pendas lia foto inter la plej grandaj slavistoj. En la ukraina katedro de Universitato Harward (Usono) sub lia portreto estas legebla: „The only professor of Rusyn language and literature.” (La sola profesoro de la rusinaj /komprene: rutenaj - rim. de A.S./ lingvo kaj literaturo.)

D-ro Attila Salga

REFERENCJOJ

(32) Keresztény Magyar Közéleti Almanach. (Kristana Hungara Publika Almanako.) I.Pátia, Bp. 1940. 127.

(33) Vidu ekz.: Borkut. (Etimologio de la vorto „borkut”). Magyar Nyelvőr, 1912.424. – Tagadómondattal a magyar-kisorosz nyelvben. (Nea frazo en la hungara-malgrandrusa lingvo.) Nyelvtudomány, 1913.219-221. – Az orosz (magyarországi) és a rutén (kisorosz v. ukrainai irodalmi nyelv kérdéséhez. (Al la problemo de la rusa kaj ukraina literaturaj lingvoj.) Nyelvtudomány, 1914-15.81-110. – A szláv kérdés. (La problemo pri la slavoj.) Magyar Külpolitika, 1925.12.7. – Az ukrán mozgalom története I-II. 1917-1922. (La historio de la ukraina movado 1917-1922.) Külügyi Könyvtár, Bp. 1922

(34) Ernő Osváth (1877-1929) kritikisto, redaktoro de la hungara revuo Nyugat (Okcidento) ekde 1908 ĝismorte.

(35) S.B.: Az orosz irodalom története, II. 17-18.

(36) Vidu ekz.: A fehér cár mesekertje. (Fabelĝardeno de la blanka caro.) Franklin, Bp.1927. – Dosztojevszkaja: Dosztojevszkij özvegyének emlékiratai. (Memuaro de la vidvino de Dostojevskij.) Révai, Bp. 1928. – Tolsztaja Alexandra: Tolsztoj futása és halála. (Fuĝo kaj morto de Tolstoj.) Révai, Bp.1929. – B. Pilnyak: A bjelokorszki uradalom. (La bienego en Belokorsk.) Budapesti Szemle, 1927. 115-123. – Tolsztoj: Szevasztopol 1854 december. (Sevastopol en decembro 1854.), Franklin, Bp. 1930. 3-19. – Tolsztoj: Szevasztopol 1855 augusztus. (Sevastopol en aŭgusto 1855.), Franklin, Bp. 1930. 62-126. – Tolsztoj: A kozákok. (La kozakoj.) Révai, Bp. 1948.

(37) Dezső Ambrozovics (1864-1919) ĵurnalista, kritikisto, konata tradukisto de rusaj klasikaj romanoj.

(38) Imre Makai (1920) tradukisto de multaj rusaj-sovetiaj romanoj.

Monteto, elvidejo, arbaro, rivereto...

Knabino ludas en la sablo, malatentante baniĝantojn kaj varmegajn radiojn de la Suno. Ŝi portas akvon en sia verda siteleto el la lageto, troviĝanta kelkajn metrojn de ŝi. La knabineto akurate verŝadas la akvon en la angulon de la sablejo. Komence ŝi decidis baki torton samtiel, kiel tion faras ŝia panjo: ĝisfunde knedi la paston, dolĉigi ĝin per sukero, meti en la paston ovoflavon... Sed hieraŭ ŝia biskvita dieta torto ne sukcesis, disiĝis, dismoliĝis. Pli volonte ŝi konstruos altan monton, surpinte kun elvidejo, ĝusta, natura, nefalsita... Por planti arbaron jen ĉe-mane bastonetoj, branĉetoj, por fluigi la rivereton ŝi devas fosi kavon. La elvidejo estos la plej alta en la tuta mondo, por ke oni povu vidi malproksimen, ĝis la gepatra domo...

En la sablejo ludas aliaj geknaboj. Por ili sufiĉas tereno. Malgranda knabo longtempe rigardas tiun konstruadon.

– Enjo, ni konstruu fortikaĵon! Mi povas konstrui pli grandan kaj belan fortikaĵon, ol mi vidis en televida filmo.

– Sed nun mi konstruas monton, elvidejon, arbaron kaj rivereton.

– Bone, sed konstrui fortikaĵon estas terure bone. Ĝi estos la plej-plej fortega en la tuta mondo, ĝi estos tiel bon-ec-aĵa!

– Kia estos tia...bon-ec-aĵa...?

– Tiu estos „supera” fortikaĵo... Ankaŭ tie estos monto, rivereto, el la fortikaĵo oni povos elrigardi Amerikon...

– Ho, tiel bone... – konsentis la knabineto.

Jen la knabo iĝas giganto: per sia ŝarĝaŭto li rapide altigas montegon, per siaj grandaj manplatoj li batadas-glatigadas, fortigadas, maldikigas ĝin.

La muregon de la fortikaĵo konstruas la knabineto el freŝa mola, akva sablo. Ĉe unu el ĝiaj anguloj baldaŭ altiĝos bastiono, propra elvidejo, de sur kiu oni povos vidi Amerikon, eĉ la gepatrodomon de ŝi. En la deklivo de la fortikaĵ-montego ŝi plantas arbojn. Sed...en la alia flanko la giganto faras krenelojn, qisas kanonojn.

La rivereto de la knabineto estas ĝisgenua. Kiu voilas supreniri al la elvidejo, povas uzi ponteton, ŝtuparon, barilojn. Ĉe la flanko de la giganto la rivereto iĝas kolerema golfo naĝiganta grandegajn batalŝipojn.

En la turo de la fortikaĵ-korto loĝas reĝinidoj kaj Dornrozinjo, kiu ege atendas la reĝidon.

Se dkontraŭe konstruiĝas municideponejo, en kiu estas kanonoj, raketoj, mitraletoj, maŝinpafiloj, bomboj.

La reĝinidoj ekiras promenadi itun belegan someran tagon. En la elvidejo ili sentas neelteneblan varmegon, ili dementas sian vestaĵon. Ho kiel belege estas bani sin en bankostumo sunbrile!

En la kontraŭa flanko la viroj bravaj preparas sin al la batalo: ili luktas, skermas, pafadas kaj levadas pezon. Kiu ne celpafas, tiun mortigas la komandanto.

– Kaj ĉi tie estos nia infanĝardeno.

– Ĉu infanĝardenaĉo?! Kiel? Idoj ankoraŭ ne scipovas batali!

– Ĉu batali? Ili tute ne deziras batali.

– Ne gravas! Ĉi tie nun komenciĝas la milito. Flugas la flugmaŝinoj, eksplodas la bomboj...ŜŜŜŜ-sss...bruuuuuu!...buummm!!!...

Ruiniĝas la loĝturo-belvedejo, mortis la reĝinidoj. Dornrozinjo vane atendas sian reĝidon.

– Idioto! Aĉulo, aĉa bufo!!! For! For!!!

Alvenas novaj bomboflugmaŝinoj... Disbombardo... Ruiniĝas la muregoj, monteroj deiĝas, timege ensorbiĝas la akvo de la rivereto, sed aliflanke la golfo iĝas maro kaj komencas agadi la teruraj batalŝipoj...

La knabineto ploregante frotas siajn okulojn per kotumitaj pugnetoj; forbrulis la arbaro, ruiniĝinte suferas la elvidejo, estas detruita la motego!... Sed en la siteleto restis ankoraŭ iom da akvo! Ŝi surverŝas lin, poste ĵetas al li akvan sablon. La „giganto” forkuras, kaj kune kun li rifuĝas la flugmaŝinoj kun bomboj, meriĝas la ŝipoj...

– Panjo! – ŝi krias, alkurinte al siaj gepatroj. – Nekonata aĉa knabo – rigardu, tie li sidas – ĝenis min ludi, li disigis mian monton...

– O, kara mia! Ne gravas. Vi povas fari alian, pli altan, ĉu ne? – diras ŝia panjo interrompante la legadon de interesa libro. – Iru, ludu plu! Ne gravas.

La kuraĝigaj vortoj de la panjo instigis ŝin iri ludi. Ŝi decidis baki torton, kaj nun ŝi portas akvon en sia verda siteleto...

Dumtempe alproksimiĝas la nekonata knabo, kaj hezite ekparolas: – Mi bombardis, ĉar tion mi vidis en televidprogramo por plenkreskuloj... Mi rigardetis sekrete...tiun fabelon ne por knaboj. Sed... sed mi tre ŝatas surfilman ursinon, kiu bakas tortojn al siaj ursidoj. Ŝi lekas ilin kiel kato la lakton. Mi montros al vi, kian ĉokoladan torton ŝi bakas...

– Ankaŭ mi ŝategas tiun ursinon kaj la idojn. Ni faru por ili biskvitan torton! Ni invitu ĉiujn bestojn el la arbaro: lupojn, leporojn, vulpojn...

– Sed la leporon manĝos la vulpo...!

– Ne, ili estas pacemaj, ili manĝas tion, kion ni, homoj. Ili ne mortigas unu la alian. Kaj tio ne estas fabelo por plenkreskuloj aŭ geknaboj, tio estas la vero mem. Ĉiuj ili estas niaj gastoj, bonaj amikoj.

La knabo kaj la knabineto knedas kune la paston – silente, pace...

Attila Salga

Ĉiu, kiu konas Esperanton kaj uzas ĝin, scias kaj sentas, ke en ĝi abundas sinonimoj – eble en iu rilato en en kvanto kiel en aliaj naciaj lingvoj, tamen ili ekzistas kaj donas eblojn por nuancataj kaj subtilaj esprimoj. Eĉ en certa direkto, precipe danke al afiksoj (mal-, -abl-e, -eme-, -re-, -ig-, -ind- ktp) ĝi povas disponi tre multajn sinonimojn kun specialaj nuancoj: akceli – aktivigi – agigi – kuraĝigi – sproni – entuziasmigi; speciale – aparte – precipe – cefe – pleje ktp.

Dum la aplikado kaj evoluo de Esperanto formiĝis kaj stabiliĝis la signifampleksoj de ĝiaj vortoj, stabiliĝis ankaŭ sinonimoj, kiuj riĉigis ĝian esprimpovon. Ilia enesto ne devas esti konsiderata kiel negativa kaj nedezirinda fenomeno.

SINONIMOJ EN ESPERANTO

DR. ATTILA SALGA

Kiu deziras uzadi la Internacian Lingvon ne nur kiel praktikan konvencian kodon por komunikado de simplaj, elementaj informoj, sed kiel lingvon por libera, senĝena komuniĝo, por esprimado de ĉiuj bezonoj de la psika aktivado, tiu ne devus kontentiĝi nur pri ellerno de la lingvaj elementoj de Esperanto, sed devas lerni ankaŭ la vortojn kun ilia ĝusta signifo kaj kun iliaj plurflankaj kromsignifoj.

Estas katerogio de absolutaj sinonimoj – ordinare du, sed foje ankaŭ pluraj vortoj, kiuj havas tute saman signifon kaj estas uzeblaj unu anstataŭ alia. Ekzemple: lingvistiko, lingvoscienco. Ofte la uzado de unu aŭ alia el ili baziĝas sur aparteneco al tiu aŭ aliaj stilistikaj tavoloj (konversacia lingvaĵo, scienca, literatura, poezia, kancelaria, ekonomia, vulgara ktp.). Ekzemple la sciencaj nomoj de plantoj, malsanoj, partoj de la organismo, paralele kun samsignifaj popularaj nomoj: galanto – neĝofloro miozoto – neforgesumino, abdomeno – ventro ktp.

Ekzistas ankaŭ kategorio de gramatikaj sinonimoj de la tipo: patra domo – domo de patro, plezure – kun plezuro k.s. La signifoj koincidas, oni povas rajte uzi ĉu tiun, ĉu alian. Gvido ĉe elekto povas esti, interalie, la eŭfonia principo: sento pri bonsonco de la tuta frazo, en kiu oni uzas tian esprimon (ĉu en ĝia kombino kun la ceteraj partoj de la propozicio iĝas facile, glate elparolebla, bonsona, eleganta frazo).

Ni tamen haltigu nun nian atenton ĉe la pli granda kaj interesa grupo de sinonimoj: tiuj, kiuj ne plene kongruas en siaj signifoj. Tio estas precipe plursignifaj vortoj. Tiuj vortoj formas sinoniman vicon (ĉenon, linion). En tiu ĉi vico ili povas diferencii inter si ĉu per pliigo de la grandeco de la esprimata nocio, ĉu per esto aŭ malesto de figura aŭ de emocia, elvokiva flankoj. Plursignifa vorto havas unu centran (kernan) signifon kaj ĉirkaŭ ĝi kromajn signifojn aŭ nuancojn. Kun la ceteraj vortoj de la sinonima vico ĝi povas esti sence (kaj uze) proksima per iu el siaj signifoj – ĉu per la kerna, ĉu per la kroma. Jen unu sinonima vico: ricevi – akiri – profiti – gajni.

Ilia komuna kerna signifo al io, kio venas en posedon de la priparolata subjekto. Sed ĉiu membro de la ĉeno havas ankaŭ ion specifan, kiu diferencigas ĝin de la ceteraj. Se ni

prezentus ilin en substantiva formo, en la vico envenus ankaŭ utilo: Kian gajnon /profiton/ utilon vi havus per tio? En tiu esprimo jam ricevo ne estus uzebla. Unu vorto – membro de la sinonima vico – kun iu el siaj signifoj povas aparteni al unu vico, kun alia signifo – al alia vico; la ceteraj vortoj de la unua kaj de la dua vicoj ne estas sinonimaj inter si. Alivorte, la sinonimaj linioj (vicoj) povas kruciĝi en unu punkto: tiu ĉi punkto estas la vorto komuna en la du vicoj. Jen ekzemploj:

ĝusta

1-a vico: preciza – ekzakta

2-a vico: korekta – (laŭ) regula – senerara

Ĝusta / korekta / regula / senerara prononco

Veni en ĝusta tempo.

Ĝuste vin mi atendis.

intereso

1-a vico: sciemo – scideziro – scivolo

2-a vico: utilo – profito – gajno – bono ktp.

Havi intereson pri geografio.

Materiala (morala) intereso.

La intereso de nia E-movado.

absoluta

1-a vico: sendependa – memstara

2-a vico: tuta – plena – senkondiĉa – nekontestebla – senescepta – nepra – senduba – nedubebla

Absoluta regopovo. / Absolutismo.

Absoluta plimulto / konsento / silento / kondiĉo ktp.

Absolute nenion mi komprenis.

(Kaj la terminoj el la sfero de la scienco: absoluta alkoholo / nulo / nigra korpo k.s.)

La ĝusta konkreta signifo de vorto manifestiĝas plej klare en ĝia ligiĝo kun aliaj vortoj, kun kiuj ĝi formas vortajn (esprimajn) kompleksojn – ĉu ordinarajn, ĉu frazeologiajn. Ofta kompleksigo de iuj vortoj fariĝas kutima, konstanta, kaj tiel formiĝas stabilaj frazeologiaj kompleksoj. La materialo pri la vortaj kompleksoj kaj ĝenerale pri la ebleco formi kompleksojn de vortoj estas grava parto de la semantiko. En naciaj lingvoj estas kolektita fakta materialo, kaj oni eltiras konkludajn principojn, laŭ kiuj klariĝas kaj evoluas tiaj esprimoj. En Esperanto sistemaj studoj en tiu ĉi direkto ankoraŭ ne estas faritaj. Tamen en la indikojn, donita en la Plena Vortaro, ni povas trovi utilajn indikojn pri la signifa enhavo de la vortoj kaj pri ilia natura, konvena kompleksigebleco.


Ankaŭ apudmeto de vorto kun kontraŭa signifo (plej ofte formata per la prefikso mal-) helpas klarigi la esencon de la signifo de vorto kaj la diferencon inter tiu lasta kaj ceteraj membroj de la respektiva sinonima vico.

Numero 066 (oktobro 1991)

KRUCVORTENIGMO

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Gyula (Julio) BAGHY (bagi)

En tiu ĉi enigmo kaŝiĝas poem-titoloj de Gyula (djula=Julio) BAGHY (bagi). Unu el la ensendintoj de la solvo-teksto en la aparta reto ricevos la universitatan studlibron de Esperanto, aplikatan en Scienca Universitato „Lajos KOSSUTH” en Debrecen, kompilitan de d-ro Attila SALGA.



HORIZONTALAJ: 1. Titolo de lia poemo 11. Fremdan literon 12. Aktiva 13. Macer' al teksebla planto 14. Pulvoro por tualetto 16. Hom' apartenanta al organizo 17. Voj' borderata de arboj 19. Rilata al fabela estulo 20. Part' de cirklo 21. Ruiniĝ', malaper' 23. Puŝ' de aero 24...idoloj regos (titolo de lia poemo) 25. Supernatura estulin' 27. Metal' pli bone fandebla ol oro 29. Refaldita border' de vesto 30. Parto de abdiko! 32. Indik' pri tempo 33. Adverbo por akcenti ion 34. Ŝakfiguro 36. Mallonga protesto 37. Virin'vivanta kune kun viro 39. Malnova ora moner' 41. Titolo de lia poemo.

18	3	4	12	5		21	11		37	3
24	18	13	16	36	22	26	5	4	29	

VERTIKALAJ: 1. ...kaj kanaloj (titolo de lia poemo) 2. De l'koro spegulo estas la ... 3. Nazia organizo 4. Elstara plat' ĉe la supro de la unua parto de la masto 5. Enspir' en la nazon 6. Malofta kaj altvalora 7. Sufikso kun substantiva finaĵo 8. Dependiga konjunkcio 9. Dekpieda markrustulo 10. Titolo de lia poemo 15. Rila...(titolo de lia poemo) 18. Agrokultura instrument' 20. Al vir', devenant6a de la antikvaj hebreoj (du vortoj) 22. Transform' de felo en ledon 23. Panfarista labor' 25. Piede moviĝi 28. Amerika land' 30. Rilata al dia favoro 31. Meritoplana 34. Malgrandaĉa (radiko) 35. Reen: ekstrema plezuro 37. Ne nur sed plie 28. Germanlingve: tre, tro (zu) 40. Kiel V.8.

Attila SALGA *

KATENITAJ LIGILOJ

La novaj kunloĝantoj ŝajnas enfermiĝemaj, timplenaj homoj, kiam ili pene portas la meblojn kune kun la transportistoj. Estus dece interŝanĝi kelkajn frazojn, se ni pasigos kelkajn jarojn unu apud la aliaj – la koridoro estas komuna, ni povos renkontiĝi ankaŭ ĉe la enirejo. Ĉu ili ne volis konscii pri tio, ke ankaŭ mi loĝas tie? Ja estis mi la unua alvenanto, ili devus do fari la unuan paŝon. Sed ne. Ili finaranĝis la aferon per nura rimarkigo „bonantagonniestas-lanovajkunloĝantoj!”. Tio estas tute nekutima por mi. Pretendis mi, kiu edukiĝis per verkoj de MIKSZÁTH, MÓRICZ, RADNÓTI (MIKsat', moric, RADnoti'), ke oni alĵetu ne en malpura ŝtuparejo, kiel la hundo, tiun mallertan salutsimilaĵon, kiu altigis muron antaŭ deklariĝo de mia bona intenco. BACH aŭ MOZART (bah; mocart) estus tuj forironta el tia nekulturita reĝkorta societo, sed mi ne povis fari tion, ĉar ĉio min ligis al tiu loĝejo; miaj memoroj, miaj mebloj, miaj libraro, sondiskaro, la intima muzikaŭskultado, miaj manĝilaroj arĝenta kaj ora, la binditaj ekzempleroj de Tolnai Világlap (Mondgazeto de TOLNAI; TOLnai), kiujn foliumi mi tre ŝatis...

Dum kelkaj semajnoj elformiĝis la skribe ne fiksita regulo: intence eviti unu la alian! Kvankam niaj pordoj rigardis al la komuna koridoro, ni ĉiam aranĝis, ke ni ne restadu tie kune, samtempe. Kun pacienca, senokupa tempokalkulado ni evitis renkontiĝi. Mi estis kontentigita de la piana koncerto bo-minora de ĈAJKOVSKIJ, muziko de VIVALDI elvokanta malproksimajn sezonojn, romanoj de JÓKAI (JOkai). Kiu scias, kiomafoje, mi refoje eklegis verkojn de Margit KAFFKA...

Poste, mi rimarkis pri mi, ke ne vere min okupas la muziko. Mi ne plu povas travivi la muzikon de VIVALDI, kiel antaŭtempe, ĉar mi iel ŝanĝiĝis. Mi ne fermis la pordon per la klinko, sen ajna kaŭzo mi malŝatis la muzikon, mi premis min pli proksimen al la muro. Kelkfoje mi ŝtele eliris en la koridoron kun libro enmane, kaj mi klopodis konstati per trafluetantaj parol-pecetoj, bruoj, kriadoj, kvereloj, ka estas miaj genajbaroj.

La edzino, kun la aĝo de 32-35 jaroj, estas blankhaŭta, lentughava, kriema. Ŝi nemulte prizorgas sin; po unu semajno ŝi ŝanĝas stratveston kaj po unu monato hejmoveston. Matene, je la sesa, antaŭ ol ekiri al la vestfabriko, ŝi trairas glitpaŝe la koridoron, longe fluigas la akvon en la banĉambro, poste faradas en la kuirejo kun vazo-tintado, fine la puŝigo de la ŝtupareja kverkopordo signas, ke ŝi foriris.

Ŝia edzo estas pli multe aĝa, pensiita. Kaduka, grizharara maljunulo kun kurba dorso. Ili akordiĝas maksimume kiel patro kun sia filino ne vidinta altaron. La viro estas senĉese gripa, li tusadas, ĝemas, dormas aŭ laŭtigas la televidilon. Dufoje en semajno li iras labori en proksiman kooperativon de ŝuistoj, poste reveninte li sin sternas sur la sofo, vestita – kun ŝuoj, vesto, glu-odoro, ledo-fetoro – li plenigas siajn pulmojn per nikotino, li tusas, stertoras sinsekve. Nokte li turnadas sin en la lito kaj raŭke tusadas. (Kronika bronkito.)

Ilia filo frekventos la okan klason, super la supra aĝlimo. Li malsukcesis plurfoje en antaŭaj klas-ekzamenoj. Pezeca, malbonvola, malbonfarema konstitucio (li ŝtelis plurfoje gazetojn el mia leterkesto). Li strebas esti ĉiam en la centro de la familio: direktas li siajn

gepatrojn, li ordonadas, disponadas, postulas, kriegas, ploras, subridas, henas, furiozas. Li ĉiam pravas, eĉ se li asertas neeblaĵon. („Kiu ja estis tiu PETÓFI /PEte'fi/? Pro kio li devas ellerni liajn idiotajn poemojn?” – „Bone, fileto, do faru ion alian.”)

Mi sciis, sentis, kiam ili alvenis, ke alvenas nekulturita, kruela, malvarmakora familio, kies anoj ne kapablis eĉ dece saluti. Ili prefere eĉ estus piedbatintaj min, la povran, senhelpan vidvinon, kiu volis proksimiĝi al ili tre afable, sed ili tenis sian fanfaronemon antaŭ si, kiel ian ŝildon.

Se nur ne estus tiuj grandegaj, humidaj MUROJ! Ili strangolas min, mi sufokiĝas, putra kelodoro haladzas tra la subporda aperturo, estas trablovo, mi sentas malvarmon... Kaj se jam tie ĉi staras tiuj MUROJ, pro kio ili estas ne el armita betono, el gumo, por ke mi ne plu aŭdu, kion ili parolas!? Ĝis nun mi tre bone vivis, tutsola en mia kulturita mondo, en mia komfortega soleco, kie ne estis MUROJ, ĉar mia imago flugis trans ilin (mia imago penetras eĉ tra betona-guma muro!), kun mia junaĝa lud-kunulo mi gaje petoldis sur razeno, ni plukadis florojn – leontodojn kaj timianojn, akileojn kaj gladiolojn... Refoje lirlis la torenteno apud nia domo. Barona fraŭlino Bernadeta ORCZY (orci) rajdis tra ĝi, sur blanka ĉevalo, kun blanka vizaĝo... Ve, ankaŭ tiuj MUROJ estas blankaj!... Tiu Seduxen (sedativo) havis bonan efikon... Ankaŭ mi estis lanugvizaĝa, svelta... En mia cejanblua robo...

Mi aĉetis la Klarigan Vortaron Psikologian de Lajos BARTHA (lajoŝ barta). Plurajn tagojn mi legadis ĝin. Neniam mi legis vortaron, ĝi ja estas dediĉita ne por legadi, tamen refreŝigas tio min, se mi trovas en ĝi tiajn vortojn, kiuj konvenas al miaj genajbaroj: aberacio (deflankiĝo, devio disde la normala), afekcio (subita ŝanĝiĝo/emo pli forta al senta, emociplena reago), malmorala psikopato (lian konduton determinas la ĝuste aktualaj emocioj, pasioj, sopiroj, instinktecaj streboj; lian sintenon ne baras konsideroj rilatantaj al kunuloj)...

De nun mi intence observis la okazaĵojn, dialogojn, kverelojn en la najbareco. La filo de la genajbaroj havas ekzemple kompansemon. Tio estas tia konduto, kiu volas kompensi ian mankon en la karaktero de la personeco. Samtempe, do, pri strebo al tia plenaloreco, kiu, kaze de la junulo, gvidas al nenormala sopiro sukcesi; trotaksado pri si mem.

– Aj, ne miksu vin ĉiujn miajn aferojn, je la putra ĉielo!

– Mi nur metis librojn tien, fileto.

– Ĉu tiujn putrajn fabellibrojn?! Ĉu mi, do malleviĝas tion, ke eĉ nun mi tenas ilin en ĉefa loko? Kaj sekve, se alvenos Bütykő (BITJke') kun siaj amikoj, ili ridaĉus pri mi, pro tio, ke mi refoje fariĝis etpaŝulo.

– Bone, sed tie estas ankaŭ tiuj de patro...

– Vi estas idioto! Ĉu tiuj?! Ĉu tiuj fabellibroj?! „Paĉjeto denove legetas libretojn.” Vi estas tia, nano, kaj Neĝulino. Kiam mi estis malgranda, tiam mi legis, sed nun ĵetu ilin en rubujon. Aŭ mi disrompos tiun ĉi putran mondon!...

– Atentu, ĝi renversiĝas!

- Nu, ne diru jam! Per komuna forto, kun patro vi ĉiam disĵetadas miajn plumbosoldatojn! Sed ekde nun estos ne tiel! Konsciu pri tio! Ni vidos, kio estos, se vi kuraĝos tuŝi miajn ludilojn. Ili neniel koncernas vin! Ankaŭ vi diras, ke mi fermu la buŝon, nun ankaŭ mi diras: fermu vi la buŝon! De nun nestos tiel!

– Tre malbelaĉe vi diris, ne mirinde!

– Tio ne koncernas min, ĝi plaĉas al mi. Vi alimaniere perceptas tion. Se mi per mi mem opinias ion idiotaĵo, tion difinas mi mem, ne intervenu! Se min vizitas Borsó (BORŝo') aŭ iu alia, ili certe aprezos tion. Sed vi iru en la alian ĉambron, ekkŝu por satdormi, ĉar vi freneziĝis...!

Tiajn „dialogojn” mi aŭskultadis ĉiutage plurfoje. Plene pompas la somero, la potflorojn mi reportis de sur la kornico, ĉar la suno bruligus ilin. Aliaj normaluloj tiatempe vizitas la naturon, pasigas siajn liberajn tagojn ĉe rivero, sed tiuj – hejme kaŭraĉas, baraktas, kriadas.

La edzo havas abulion, mankon de volpovo, malsanan nekapablecon pri aktivado. Li legas, televidas, aŭskultas radion, dormas, ronkas, enkaj el-litiĝas nelavinta sin, cindromakulas la tapiŝon... Kaj la edzino suferas pro konfabulacio. Ŝi rakontas okazintaĵojn ne konformajn al la realo, kvazaŭ ili estus okazintaj.

– Pro via maljuneco vi eĉ litofekos, vi tie ĉi kuŝaĉas kiel lignopeco. Vi pigras eĉ por trinki akvon, vi emas ne iri eĉ en la kuirejon, kaj vi cindromakulas la tapiŝon per via fetora cigaredaĉo. Tiam mi estis la plej stultega, kiam mi edziniĝis al vi. Ankaŭ Pista KISS (piŝta kiŝ) estus preninta min, li petegis genuante, ke mi elektu lin, li estus oronta mian nomon, krome li donacus al mi sian domon... Sed mi..! Mensmankulino! Mi elektis tiun ĉi kadukan, ŝrumpintan virhundon, kaj ĉu tio estas dankemo?! Li eĉ pajleron ne reordigas, li nur kuŝaĉas, kaj mi estas preskaŭ superŝutita de labortaskoj! Tiam mi estis bovo, la plej granda, kiam mi estis elektanta ne Lajcsi-n NEMES-on (lajĉi nemeŝ), ja ankaŭ li petegis min! Li sekvis min eĉ en la kermeso de Vásárhely (VAŝar'hej), li aĉetis por mi eĉ kermes-donacon; tie gruntis porkoj en staletoj, bovinoj blekis en stalo, kaj estis ankaŭ ŝafoj, kaj ĉevaloj, kaj, tie ĉi, jen nur putrejo. La putro min trafu, malhumiliĝo min hontigu, Jesuo Kristo ne pardonu min...!

Miaj genajbaroj estas malsanuloj! Maldece parolantaj, ilia nenormala konduto estas tute fremda en mia harmonia mondo. Kaj mi devas dividi kun tiaj uloj mian koridoron, la akvon el la krano, la esron, la MUROJN!

Kiam mi ne plu forportas tiajn konfliktojn, mi ŝaltas la gramofonon, sed mia animo ne kapablas transformiĝi refoje, la muziko ne saturnas ĝin, mi ne povas unuiĝi kun ĝi. Ankaŭ legado ne okupas min, ĉar la homa fieco kaj la malbonvolo penetras eĉ sub pordo, eĉ tra la MUROJ... Kiam la urba konsilio disponis al mi tiun ĉi loĝejon, tiam ne temis pri tio, ke tiaj elementoj amarigos mian vivon...

Antaŭ nelonge mi certiĝis pri tio, ke pri la tuta familio estas karakteriza la projekcio, nome tio, ke siajn sopirojn, mankojn ne konfesitajn ili regule projekcias al aliaj, ili atribuas al aliaj... La potflorojn ĉe la ŝtuparej-pordo mi trovis renversita, la tero fluis el ĝi, mia belega geranio estis distretita... Mi havas vere pacan naturon, mi scias akomodiĝi, se

estas necese, sed tio jam superis ĉion. Mi ricevis ĝin de Marika, mia pleje ŝatata disĉiplino, kiam oni pensiis min: „Por rememorigi, kiel eterna memorigilo, kun amsentoj kaj dankemo.” Mi eĉ nun gardas ie la slipeton. Mi mem akvadis, flegis ĝin, ĝi floris senĉese, ĝi estus primirata, se mi lokus ĝin ekstere, ĉe la enirejo, sed mi havis grandan zorgon por ĝi. Kaj kiam venis tien tiu, kaj ili piedbate rompis eĉ la elementajn kunvivado-regulojn. Nur tiu bubaĉo devis esti, ĉar eĉ liaj okuloj estas suspektigaj.

Mi tre nervozis, mi prenis sedativon kaj tiel mi frapetis ĉe ilia pordo. Mi eniris, ĉar mi ne ricevis respondon. Estus bone ne fari tion! Putra ŝim-odoro haladzis el ĉie... Kontraŭe malnova vitrinserio kun fendita, rompita vitro, polvokoloraj sofoj kunŝovitaj, sur ĝi la maljunulo en sia malpra laborvestaĵo. La knabo ludis surplanke per siaj plumbosoldatoj. La edzino kun vitrecaj okuloj gapis al nenio... Fetora brand-odoro! Naŭzosenton mi ekhavis, mi ne kuraĝis iri de la pordo internen...

– Kion pestan vi volas?! Nu?! – La virino surrigardis min, sed mi supozas, ke ŝi ne vidis min, ĉar ŝi direktis sian parolon al si.

– Turpa megero, fermu la pordon, estas trablovo! – Tiu bubo kriis al mi tiel, kiel kutime al sia patrino. Sed poste la pordo fermiĝis per si mem kun laŭta frapsono.

– Mi petas vin, mi venis por..., ĉar... nur via filo povis esti tiu, kiu distretis mian geranion ĉe la enirejo...

– Lackó estas bone edukata de mi, notu tion bone por vi, li ne okupas sin pri viaj malpuraj floroj. Kaj, cetere, kiu vidis tion? Ĉu iu?! Ĉi vidis iu, nu?! Estus bone, se vi ordadus en via loĝejo propra. Vi frumatene frapadas la pordon, kaj fluigas akvon el la krano, vi tintigas per kaseroloj, kaj faras trablovon. Kaj nun ĉu vi distretas eĉ vian propran floron?! Ni scias, ke vi estas ne normala, oni diris al ni, sed je sakramento, notu por vi, ke ankaŭ ni loĝas tie ĉi, kaj ĉio tie ĉi apartenas ankaŭ al ni! Vi ĉiam nur kuŝaĉas hejme, konvulsias, ne kuraĝas iri sub la subradiojn, vi timas, ke vi degelus. Kaj ni povas iri nenien pro vi, ĉar ni ne kuraĝus forlasi la loĝejon. Malbenita, turpa megero, sed neniel kraĝu bruligi ĝin, ĉar ni preparos sapon el via graso!...

(daŭrigota)

Numero 069 (aprilo 1992)

Attila SALGA *

KATENITAJ LIGILOJ

(daŭrigo)

Estas somero..., varmega, sufoka... En blanka robo, kun blua zono ĉe la talio, kun blua banto en la hararo, mi kuras volante atingi la horizonton... Mi konkuras kontraŭ la cirusoj, mi kunportas la venton, la bonodoron... Se mi volas, mi estas forta kiel demono, se mi volas, kara kaj aminda kiel la lipoj de virgulino... Jen vidu, cejaneto! Pro kio vi klinas knabineske vian vilan kapeton? Mi kuras ĉirkaŭ vi, mi regajigas vin... Vi, papaveto, pro kio vi fanfaronas kun via ruĝa kresto? Vi estas bela, fiera, vi sentas vin giganta, vi pavaĉas kiel grandega virkoko sur la supro de rub-monteto! Sed mi estas pli grandega ol vi! Mia vento-alo frapas vin, kaj tuj flugas plu kun mi via ruĝa fiero... La delfinio eĉ tiel klinas sin antaŭ vi, kaj vi estas nenio ĉe la rando de tritik-kampo, nur verda tigeto restis el vi, vian ovarion frakasos hajlo, kropo de birdoj konsumos vin, kalandro penetros vin, la varmega Suno velkigos vin, kiel teda ludilo de infanoj vi finos en fajro...

Nun mi iomete rekonsciiĝis. Nova sedativo efikis bone al mi, dormo kaj poste malvarma kompreso. Tia hontego neniam en la vivo trafis min! Tiajn vortojn neniam ĝis nun oni ĵetis al mi! Ho, dio! Ili faris stalon el mia loĝejo. Tiu fetoro, tiu kel-odoro saturiĝas en ĉion, mia sango malrapidiĝas pro ĝi... Do, al kiu mi malutilis?! Ĉu mi ofendis ilin? Mi retiriĝis en mia propra mondeto, mi ne prizorgis ilin. Sed ili ne lasis min en paco...

Povra Ludoviko, se vi nun estus kun mi...! kiel aminda vi estis, kiam vian vilan kapon vi klinis en mian sinon. Tion ĉu vi rememoras ankoraŭ, kiam vi kuris en la korton, rekte al la notario, kiu venis vizite al ni. Kaj li kaptis vin, ĵetis en la aeron, poste li refoje kaptis vian korpeton kiel pilkon. Vi nur ŝriketis, kriadis. Poste vi neniam pardonis lin gro tio, vi ĉiam kaŝis vin kiam li venis, kaj vi estis ne relogebla ec per via ŝatata silkosukero. Sed la sinjoro notario estis bonulo... Vi diras, ke eĉ tiam elmontriĝis liaj dentoj kiam lia buŝo estis fermita? Li tute ne kulpas pro tio, ke li naskiĝis kun tia beleco-makulo... Maltrankvila, senripoze moviĝanta infano vi estis: foje vi tiel longe kuris, ĝis vi kunfalis, mi mem flegis vin, metis sur vin kompreson, mi ventumis vin, sed post duon-horo vi frandadis jam en la kuirejo...

...Sed tio okazis ankoraŭ tiu...

En la vortaro mi trovis tre multe da fakesprimoj. Ĉiuj konformas al la malsanoj de la genajbaroj. Ciklotimio: mania-melankolia psikopateco, humorsanĝiĝo. Cinikismo: malkaŝe moka vidmaniero kaj konduto ne honoranta moralajn valorojn kaj akceptitajn kutimojn. Cirkula psikozo: tiu formo de la mania deprimiĝo, en kiu la maniaj kaj melankoliaj etapoj intermite sekvas sanajn statojn, aŭ sinsekvas sen sanaj etapoj, tio estas, ili okazas miksite kaj sekve periode ripetigante. Familia konstelacio: aro de tiuj traktoj, kiuj trafas la infanon sekve de la interrilato de la familianoj. Degeneriĝo: grado-poa-grada denaturiĝo, malboniĝo de iu organo aŭ iuj organoj, kaj pensmaniero aŭ karakter-esprimiĝoj. Deprimiĝo: misagorditeco, depresio (melankolio). Egodiastolo: troa, pliigita mem-konscio, trotakso de la memvaloro. Egoismo: stato kaj konduto karakterizantaj tian homon, kiu metas siajn interesojn proprajn antaŭ la interesojn de la komunumo, socio kaj ĉiuj aliaj...

Miaj genajbaroj estas malsanaj, nervomalsanaj homoj. Kio estos, se foje eksplodos en ili piromanio (malsana manio bruligadi) aŭ niktofilio (malsaneca prefero al nokto aŭ mallumo), eventuale niktofobio (malsaneca timo pro nokto aŭ mallumo)? Ĉe ili povas okazi somnambulismo (dormirado, lunatiko, kiun sekvas ofte faro de pluraj malsimplaj agoj)!

– Atentu, edzino! Ne diru al mi, ke tie ĉi mi nur kuŝaĉas, ĉar ankaŭ nun mi ne dormas. Kaj nokte vi ĉirkaŭ dekfoje saltis la lampon, vi ne lasis min dormi. Ne volu, ke mi detruu kaj bruligu tiun ĉi malpuran ĉifon-kameron!

– Bone jam, ne saltadu?! kaj vi, kiam nokte iradas, neniam vi vidas, kaj ĉiam vi puŝiĝas al io. Ĉu vi ne taŭgas eĉ por esti lunatiko?

– Ĉu mi? Mi ne havas kutimon eliradi! Vi parolas idiotaĵojn.

– Vidu, he, ronko-maŝino! Vi ne scias eĉ pri tio, ke vi eliradas. Vi, do, vere estas lunatiko, ĉar vi ne scias pri tio.

– Via patro falis de sur tegmento, ne la mia, kiu mortis en lito.

– De kie li estus falinta, he, se li estis masonisto? Ĉu vi vidis jam tagmeze, je la dekdua, lunatikon iradi surtegmente?

– Aha! Vi nur diras tion. Sed hejme oni parolas alion...

– Alion, alion...! Pri via patrino oni rakontis, ke ŝi estis granda putino. Ĉu nun ankaŭ mi kredis?

– Mian patrinon neglektu, ĉar ŝi freneziĝis pro vi, ŝi ne forportis, ke tian megeron vi edzinigis, kies postaĵo barelece dikiĝis... Nia Patro. Dio...! Liberigu min de la malbono...!

Mazoĥismo: seksa malordaĵo, ĉe kiu la orgasmo estas ligita al korpa doloro, kiun estigas ĉu la individuo mem, ĉu alia persono de la alia sekso. Edip-komplekso: subpremata sopiro por seksa rilato kun unu el la gepatroj, kun alia sekso...

Dio, mia! Fariĝu via volo... !

– Patrino, vi ja tamen povus esti bonega virinjo, se vi ne drinkus.

– Kaj tiel kia mi estas? Mi ne estas ankoraŭ tro maljuna, ĉu ne, kaj ankaŭ miajn sulkojn oni povus iel forigi. Nu, diru, ke mi ne estas malbela!

– Do...kompare al patro...vi povus viziti ne ajnakvalitan diskotekon... Se ekzistus...por maljunaj knabinoj, sed tie vi povus esti bonega virinjo.

– Via putra patro nur kuŝaĉas, kun li ni sukcesas en nenio. Foje mi ne scias ĉu knabo aŭ knabino mi estas. Ĉar por li estas egale. Sed vi estas alia, tute alia! Viaj okuloj estas belaj, kaj la koloro ankaŭ de via hararo estas bela. Vi vidos, ke la junulinoj pro ĝojo pisis ĉe bariloj, se vi preteriros. Sed mi ŝatus, ke vi ne foriru, sed restu kun mi...kaj venu en

mian ĉambron por dormi, ĉar mi timas, ke via patro foje ponardos min. Vi ja vere povas defendi min, se estus necese...

– Ne feku pro paniko, panjo! Se mian poŝmonon vi altigos per cent forintoj semajne, kaj se mi rajtos aĉeti laŭplaĉe, do, tiam eventuale... Kiel damne malplaĉa vi estas! Pro kia plago vi edziniĝis al li, kial vi lasis, ke li ekkacu vin? Ĉu tiam ne estis altnoda la kanzono "vi fuŝe kuŝis"?

– Ne bleku jam!

– Blekilon havas nur la ĉevalo krom vi!... Ĉu vi volas bati min?! Nu, mi intervenas tion! Jen...jen...akceptu...

– Aj, mia kapo!... Batu, batu min pli malsupre... Tie...tie...pli forte...eĉ pli forte..., ho, kiel bone...(...)

Post unu semajno, en matena horo, iu administristo de Administra Entrepreno por Nmoveblaĵoj trovis la sekvan leteron inter la aktualaj poŝtaĵoj: "Estimataj! Ni informas vin, ke post ĉirkaŭ du monatoj ni komencos la renovigajn laborojn de la kunluataj partoj en la loĝejo strato Batthyány, n-ro 42, 2-a etaĝo, 4-a pordo. Tiun ĉi disponon necesigis tio, ke la loĝejo konsistanta el du kunluataj ĉambroj, rigardantaj al la sama koridoro, apud la loĝejo de vi, Estimataj, estas jam de jaroj vakaj, ilia stato malboniĝis. Samtempe ankaŭ via loĝejo estos renovigata, por tio ni donas al vi provizore, por la tempo de la restaŭro, urban loĝejon luatan en la strato Hőforrás, n-ro 11..." - Pro kio la poŝto ĝin reportis? Aha, jes... "La adresito forpasis." ankoraŭ antaŭ la transloĝiĝo... Eble estas pli bone tiel...

** Tiu ĉi sociologia verko de **Attila SALGA** (Atilla Ŝalga) aperis en Hevesi Szemle (Revuo de Heves; heves) en la hungara lingvo, 1983/4, pĝ. 8-11.*

Numero 075 (aprilo 1993)
PRIVATIGO
**ŜUTEGO DA
KOMPENS-KUPONOJ**

Pro kio mi hejmenvenis el Ameriko ?

Verkis: **Attila SALGA**

Post longa foresto mi revenis el Ameriko, ĉar mi legis, ke Hungario enpaŝis en la vicon de la riĉaj landoj, ja ĝi akceptas pli kaj pli multe da monpruntoj, tiel ĝi havas kion bonan doni en la buŝon. Evidente, tio instigis politikistojn, por ke oni donu kompenson, kontraŭpezon al la homoj, multe suferintaj sub la antaŭa reĝimo, al la persekutitaj, kaj al tiuj kiujn trafis ia financa malavantaĝo.

Mi revenis por preni mian justan heredaĵon... Well (=nu, bone), en 1947 mi aĝis entute nur tri jarojn, kiel knabeto ludanta en sablo. Mi scias, ke mi ne rajtas repostuli la sablon de strato kaj nian apudvojan fosaĵon, mian laŭrajtan aŭ nerajtan posedaĵon taŭgan por kat-ludi. Sed Gyurica (djurica) – kiu poste fariĝis komunisto – ĉiam trabatis min kaj rabis miajn ludilojn, do, estis li ŝtato en ŝtato, pardonon: en fosaĵo. Li kote surtretis mian memrespekton, mian Junecon kaj ankaŭ miajn botojn. Mia paĉjo, en 1952, estis registrata en maldung-listo, tiel li ne ricevis oficon konvenan al lia eruditeco. Kiel estas konate, kulako ne estis bona ofico. Cetere, en 1943, malgraŭ lia volo, oni transportis lin en la Dono-kubuton (tio estas apliko de korpa-anima devigo, neglekto pri persona libereco, eksperimento je devigo al frostmorto), sed feliĉe, li propravole fuĝis hejmen. Komence de la kvindekaj jaroj, kiel esperantisto, li estis transportata en Recsk-on (reĉk) por korpa-anima kaj lingva reedukado.

Mia avo en 1915 trafis rusan militkaptitecon, kaj tiujn kvar jarojn kiujn li pasigis en puntendaroj neniam ĉi-hejme oni kalkulis por lia pensio. Poste en 1919 komunistoj devigis lin transdoni la 90 rublojn, kunportitajn el Rusio, kiel milit-rabaĵojn. Mi nomas tion pre-alŝtatigo. La avo de mia pra-praavo batalis en la armeo de RÁKOCZI (Rako'ci), sed labancoj (soldatoj de la aŭstra armeo imperiestra) kaptis lin. Li punsidis dek jarojn senkulpa, liajn posedaĵojn oni konfiskis, lia kastelo fariĝis ĉies predo, tio estas, oni pre-prealŝtatigis ĝin. Alia antaŭulino, mia avino praa sur la kvadrato, aŭtune de 1552, elstaris ĉe la defendo de la Eger-fortikaĵo: kuiris ŝi la buljonon, kiun oni verŝis sur la kapon de sieĝantaj otomanoj-turkoj. Kiam ŝi kolektis legomojn en sia ĝardeno por la sekvonta buljono, koloniantaj janiĉaroj kaptis kaj ekzekutis ŝin. Ŝian faman legomĝardenon la ŝtato eĉ nun fruktuzas - por prezaltigo.

Estas fantazie, ke en 1241, en la regado de Béla la Kvara, mongol-tataroj faris kian pereigon en nia lando. La kabanon de miaj pragepatroj de la kvara radiko oni forbruligis, iliajn familianojn oni turmentis, senvivigis. Well..., se la eta Gyuri (djuri) - kiu ĝuste tiam malkovris medio-poluadon en proksima arbaro - ne estus restinta en vivo, nun ankaŭ mi ne vivus, ĉar mia genealogia arbo pereintus.

En la tempo de la patruj-okupado, princo Árpád senigis Csongrád-on (ĈONgrad'), iun el

miaj prauloj, de ĉiuj liaj posedaĵoj kaj digno, ĉar li jam tiutempe fidis demokration. Li ja klarigis al la princo, ke estus pli bone setli en okcidento, ĉar ni estus pli proksime al monpruntoj. Oni devigis kontraŭ li fikcian proceson, kaj la juĝo estis radumo kompletigita per kvaronumo.

Kiam miaj prauloj en la regiono de Uralo trinkis ankoraŭ kumison, mia praavo de la sesa kvadrato intermalpaciis kontraŭ hunoj, pro tio la obstina Attila (a'tilla), la vipo de l' Dio, senigis lin de la praelementa rajto manĝi, damnable lin je malsatmorto.

Mi povus plilongigi la liston, sed mi opinias, ke mi envicigis sufiĉe da faktoj por pruvi mian pravon. Mi eksterordinare ĝojas, ke mia kara patrujo enpaŝis en la vicon de civilizitaj landoj, kaj ke ĝi honoras ankaŭ finance tiujn multajn suferegojn, kiujn devis traserenti miaj geprauloj.

Multaj homoj opinias, ke nevideblas por kio Hungario elspezas la mongruntojn. Je ĉia kaŭzo, ni jam havas certan punkton: kompenson kontraŭpezon... Well!. Sinjoroj, mi devas vivi tie ĉi...

trad.: **Tibor PAPP**

La efiko de la perforto al lekantetoj

Brutaleco sub egido de kulturo

La perforto-ondo ŝajne nehaltigebla komence kredeble tute naturmaniere penetris en la rondojn de literaturo, filmo, teatro. La pretendo figuri la realon elformis tiun tendencon. Sed nuntempe jam superkreskas la batalfilmoj la realecon de la mondo. Imagi kavaliron sen timo kaj insido la infanoj ne kapablas sen insido kaj finto, sen karateo kaj pistolo, ĉar sub la egido de la usona kulturo (prefere: subkulturo) oni senĝenaĉe dozadas en la televido brutalecon, murdon, superruzon, ĉantaĝon, rabon, la filozofion de tamen, de ĉiapreze.

Tiel oni povas fari alloga la krimulan vivmanieron, ja - laŭ la tre ofta moralaĵo - murdinto povas malobservi leĝon, pafmortigi detektivojn, kaj li venkas. La perforto povas fariĝi tenta, ĉar pruvas la usona „realo“, ke tretante tra ies korpo kaj animo, baze de la proverba seksago de la pli granda hundo, en ĉio vi povas esti venkanto. Kaj la kompetentuloj ne rimarkas, aŭ ne volas rimarki tion. Kaj cetere: kie nun troviĝas kompetentuloj, tio estas, respondeculoj.

TIU ESTAS MALAMIKO, KIU MALVENKAS

Mi interparoladas kun dek knabetoj el la grandula grupo de infanĝardeno, pri iliaj ŝatataj televid-programeroj. Post fabeloj, ili rapide ekmencias la ekscitajn filmojn, en kiuj „iu oĉjo trabatas alian“, „li direktas frapegojn al liaj vangaĉoj“ (!), „per pistolo li pafmortigas la malamikon“. Ĉu kiu estas malamiko? Ĉiam tiu kiu malvenkas.

Surkorte ili ofte imitas iujn filmscenojn, sed ili atentis pri la karate-kikoj, ili ne postlasu spurojn, kaj cetere, la onjoj infanĝardenistinoj emfazite malŝategas tiajn agojn. Ili klarigas al mi, ke la filmon „Dallas“ oni prezentas vendredon vespere, sed se ili ne iras en la infanĝardenon, ĝi estas videbla ankaŭ sekvamatene. Ili ja ne ĉiam sukcesas rigardi ĝin tra ŝlosil-truo au tra pord-aperturo, sed Jockey (ĝoki) vane estas tiom forta kaj impertinente disputema, li jam ricevis kelkajn „pusojn“ (!).

Je mia demando. Ĉu ili scias kion signifas la vorto „perforto“? Ili klarigas superkriante unu la aliajn: kiam iu pugnadas, pafas, karateas, ŝtelas, frakasas drinkejon. (Laŭ Gregorĉjo nur Blazio estas perfortema en la infanĝardeno, ĉar onjo infanĝardenistino rimarkis, kiam li renversis Ritan, kaj poste li piedbatis ŝin, pro tio oni punis lin.

Kvin knabinetoj, aliĝintaj al nia grupo, modeste, ridetante aŭskultas. Poste klariĝas, ke ili ne ŝatas, se la knaboj ludas Zorro-n aŭ ion laŭ „ejĉbio“ (HBO = hejma kablotelevido), ĉar tiatempe ili „lukte surterigas“ ilin, ektirante ilian hararon. (Laŭ Gregorĉjo tio ne estas vera, ĉar la knabinoj kutime dedorse puŝfaligas ilin, kaj tiutempe ili revas revenĝi.)

KIU HAVAS PLURAJN VIVOJN, TIU RAJTAS REFOJE BATALI

Kiun oni pafmortigas, tiu devas surteriĝi, sed okazas, ke ili pritraktas, kiu havas kiom da vivoj, ke se iu havas plurajn, tiu rajtas batali refoje.

Ili ne komprenas pro kio oni batas negrojn en tre multaj filmoj. „Ili certe ne scias, ke ili estas el ĉokolado” – aldonas Briginjo, estigante per tio laŭtan rido-ondon. Intertempe de subridoj ili envicigas, kion ankoraŭ ili ne komprenas. Ĉu vere mortas la oĉjo aŭ la onjo? Kio estas la diferenco inter „spuristo” kaj „policano”? Ĉu nun vere li frakasis lian mienon? Sed, do, tio tre doloras lin!” Kiun klason frekventis tiu pistolulo? Pro kio la gepatroj permesas al li pafadi? Ĉu la plenkreskuloj rajtas fari jam ĉion?

Ankaŭ mi povus diri multajn demandojn, sed mi timas, neniuj povus doni meritajn respondojn. Sub la signo de la usona „kulturo” mi preferas diri nur jenon: *no comment!*

Attila SALGA

el Világító Ceruza (Lumanta Krajono), majo 1993, trad.: TP

Numero 077 (aŭgusto 1993)

Attila SALGA

VI RIGARDAS...

(Úgy nézel...)

Vi rigardas okulen,
kvazaŭ malkovrante ene:
ranoj-serpentoj de insulto
eĉ kriplige trabatitaj
timigas per mut' kaj plormulto.

Vi rigardas okulen,
kvazaŭ malkovrante ene:
blankas makulo vaka,
kiun anstataŭ miaj vivjaroj
faris vi longe nehavanta.

Vi rigardas okulen,
kvazaŭ malkovrante ene
formiĝi nian konstelacion,
kaj vidante ĉu ni sekcos
fluge falstelan trajektorion..

Traduko de **Tibor PAPP**